

juna amiko

septembro 2020 • n-ro 3/2020 (164) ←



**PROGRESIGA REVUO
POR LEGANTOJ
INTER 10- KAJ
100-JARAĜAJ**

△ Lernojar-komenca marŝtendumado
de lernantoj el La Granda Ursino, Svislando.
Konversaciaj temoj: Ĉu tendumi aŭ ne tendumi?
Hans Christian Andersen. *Lude:* La fino kronas la verkon.
Interkultura Mondo: “VEKI- ĜU” venkas koronaviruson...

Kolibrido





Enhavo



Enkonduke: Karaj amikoj! (Stano Marček, SK); Karaj legantoj! (Mireille Grosjean, CH) 4



Konversaciaj temoj: Ĉu tendumi aŭ ne tendumi? (Judit Felszeghy, HU) 5



LUME: El mia kolora vivo (Pavel Rak, CZ) 10

Legu kaj ordigu (Mireille Grosjean, CH) 11



Fabelo: Pri Hans Christian Andersen (1805-1875) (Mireille Grosjean, CH) 12



Kantu kun Juna Amiko:

Kantu pri numeroj, bestoj kaj koloroj (Małgosia Komarnicka, PL) 13

Elstaraj virinoj:

Florence Nightingale (Renée Triolle, FR) 14



LUDE, la unika dua etaĝo: La fino kronas la verkon (Mónika Molnár, CH) 16

Legendo: La oreloj de la kuniklo (Jozefo de J. Campos Pacheco, CU) 18

Tra la mondo: La 6-a Esperanto-staĝo en Métabief (Liba Gabalda, FR) 19



METABIEF 23-29.8.2020

Recenzo: Fascinaj popolaj mitoj (L. Carol, IL) 20



Legu librojn – premioj – konkursoj:

Klubo de bona libro. Ek-konu mian landon pere de ĝia legendo. (Małgosia Komarnicka, PL) 22



Kian stultan ideon mi havis... (Mireille Grosjean, CH) 28

Recenzo: Fascinaj kutimoj kaj festoj (L. Carol, IL) 29

Poezio: Poemo pri la gepatra lingvo (Renato Corsetti, IT) 30

Rakonto: Eta fratino (Laure Patas d'Illers, FR) 30



Interkultura Mondo: “VEKI-ĈU” venkas koronaviruson...

(Elena Nadikova, RU) 31

Arto: Armenaj tapiŝoj (Lida Elbakyan, AM) 34

Magiaj ciferoj (Renée Triolle, FR) 37



LASTE, la tria etaĝo: Kiel kontakti unu la

alian? (Stefan MacGill, NZ/HU) 38

Eldonanto de Juna amiko: Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). Jura sidejo: Centra Oficejo de UEA, Roterdamo, Nederlando. **Retejo:** sub rekonstruo ĉe ilei.mondo.info. Ĉefaj informoj pri *Juna Amiko*: <http://ilei.info/revuoj/?lingvo=eo>. Historio de la revuo: http://eo.wikipedia.org/wiki/Juna_Amiko. La numeroj de 0 ĝis 138 (1972 ĝis 2014) estas publike legeblaj ĉe: <http://www.eventoj.hu/juna-amiko/>. Vidu ankaŭ lernu.net kaj edukado.net. **Redaktoro:** Stano Marček (Zvolenská 15/21, SK 036 01 Martin, Slovakio), [stano.marcek@gmail.com](mailto:marcek@gmail.com) aŭ redakcio@gmail.com. **Lingvaj reviziantoj:** Karine Arakeljan (Armenio), Doi Ĉieko (Japanio) kaj Utho Maier (Germanio). **Rubrikestroj:** Judit Felszeghy, Stefan MacGill (ambaŭ el Hungario), Małgosia Komarnicka (Pollando), Mónika Molnár (Svislando), Elena Nadikova (Rusio), Luiza Carol (Israelo). **Kunlaboranto:** Raita Pyhälä (FI). Presita en Slovakio. **Administranto:** Sebastian Cyprych, ilei.officejo@gmail.com. **Landaj Perantoj** sur la p. 39. La sekva numero aperos en septembro 2020. **Limdatoj por sendi kontribuojn:** ĝis la fino de januaro, aprilo, aŭgusto kaj oktobro. **Jarabono** € 18 en tiel nomataj A-landoj kaj € 13 en B-landoj, laŭ la kategorioj de UEA (€ 15 kaj € 12 por mendo de 3 aŭ pli da ekzempleroj al la sama adreso).

ISSN 0230 1318



Karaj amikoj!

La koronavirusa pandemio bedaŭrinda daŭras – kaj respogas tion ankaŭ tiu ĉi numero de *Juna Amiko*, kiu alportas al vi aktualajn legaĵojn, sed ne nur: kun *Juna Amiko* vi nun povos ankaŭ tendumi kaj veturi per rulaŭto, kolorigi bildon, legi kaj ordigi frazojn, ekscii pri aventuroj de la fama dana fabelverkisto Hans Christian Andersen...

Frontpaĝo de la numero montras lernantojn de la svisa lernejo La Granda Ursino, kiuj preparas por nia revuo la rubrikon *Lude* (nun denove pri la korona viruso), kaj kiuj komence de tiu ĉi lernoĵaro marŝis kaj tendumis en montaroj. Sur la dua paĝo vi povas denove ĝui belan komikson aŭ bildstrion. La rubriko *Tra la mondo* raportas pri la ĉi-aŭgusta programriĉa Esperanto-staĝo en franca montaro. La recenzo pri la libro *Ĉinaj mitoj* konatigos vin kun multaj malnovaj, fascinaj, sed ankaŭ edukvaloraj rakontoj kaj mitoj.

Kun *Juna Amiko* vi denove povos lerni kaj kanti, ĉi-foje pri numeroj, bestoj kaj koloroj el la lernolibro *Urso-kurso*.

Pri la brita pionira flegistino Florence Nightingale vi povos legi en la rubriko *Elstaraj virinoj*. En la rubriko *Lude* vi ĝojkrios kun la Ulidoj, kiuj post la unuaj koronavirusaj “ferioj” povis denove iri en lernejon, revidi amikojn kaj ludi kun ili.

La rubriko *Legu kaj ĝuu* ebligas pluan legadon dum la pandemia periodo, prezentante la libron *Urseto* kaj la landon Slovakio, kun ĝiaj tri malnovaj legendoj.

Ĉu ankaŭ vi havas iam stultajn ideojn? Konatiĝu kun unu ideo de la prezidantino de ILEI. Kaj ĉu vi scias, kie troviĝas Tanzanio kaj kiel aspektas la svahila lingvo kaj eĉ poemo en ĝi? Jen poemo pri la gepatra lingvo. Sekvas rakonto pri eta fratino kaj la hundo Ŝuŝu, raporto pri la ĉi-jaraj virtualaj renkontiĝoj kaj kongresoj pro la korona pandemio, artikoloj pri armenaj tapiŝoj, magiaj ciferoj, kaj konsiloj kiel kontakti unu la alin, en la rubriko *Laste*. Agrablan legadon!

Stano Marček

Karaj legantoj!

En la vivo estas ĝojoj, devoj, danĝeroj, feliĉoj, ekscioj, laboroj... Same en tiu ĉi kajero de via revuo *Juna Amiko*. Tia ĝi devas esti. Legante ĝin, vi povos amuziĝi, ekscii, distriĝi, lertiĝi. Ĉar ni ne vivas solaj, **solidareco** gravas inter ni, ĉu familianoj, ĉu samklasanoj, ĉu najbaroj. Pro tio mi ŝatas aldoni **solidarecon** al tiu komenca listo de facetoj de la vivo.

Vi revidos la Ĉaledon Abioj de Amikeco en Métabief, Francio, kiu jam aperis kovrilpaĝe de *Juna Amiko* 2018, tria kajero. Tiu feria domo estis aĉetita kaj renovigita de grupo de parizanoj, kiuj volis oferti malmultkostajn feriadojn



al urbaj infanoj el modestaj familioj. Do **solidareco** gravas por tiu skipo, kiu plu prizorgas la domon.

Solidareco ankaŭ aperis okaze de niaj virtualaj renkontiĝoj en la lastaj monatoj. El proksimaj lokoj ni povis esti **kune**, ni povis havi ne **kunvenojn** (ĉar neniu venis...) sed **kundiskutojn**, interŝanĝojn de ideoj kaj informoj, ankaŭ reciprokajn **kun-sentemojn** kaj **kundividadon** de emocioj.

Solidareco estas komuna respondeco, atento kaj respekto al la aliaj personoj. En nia movado **solidareco** estas tre solida sento, kaj tio estas unu el la valoraj facetoj de nia komunumo.

Ni **kune** legu nian ŝatatan revuon *Juna Amiko*.

Mireille Grosjean
prezidanto de ILEI



Ĉu tendumi aŭ ne tendumi?

Help-materialo por progresemluloj. Rubrikestro: Judit Felszeghy

I. La decido pri la tendo

La edzo Ludoviko (L) kaj lia edzino Karla (K) babilas en sia hejmo, iun frusomeran vesperon.

L – Kion vi serĉas en la interreto, mia kara?

K – Tendojn...

L – Tendojn? Sed ni ja havas tendon! Sufiĉe novan, grandan, komfortan kaj ...

K – Ĝuste pri tio temas, Ludoviko! Mi rigardas, kiom kostas tiaspeca tendo, ĉar... mi pensas, ke eble ni vendu la nian.

L – Sed kial? Lastjare vi diris, ke vi mortos, se vi ne povas fuĝi el la urbo somere. Vi mem elektis ĝuste tiun ĉi tendon, por ke ni povu restadi en la naturo dum la someraj semajnfinoj. Mi ne komprenas! Kial vi volas nun vendi ĝin?

K – Karulo, tio estis ne lastjare, sed jam preskaŭ antaŭ du jaroj.

- L – Bone, sed la tendo estas ankoraŭ tute nova, komforta, granda kaj...
- K – Kaj daŭras preskaŭ unu tutan tagon starigi ĝin. Du dormoĉambroj, kuireja parto, banĉambra parto, teraso, plankoj, kovriloj, kurtenetoj, stangoj, ŝnuroj. Ni krome kunportas la faldeblan vestoŝrankon, la faldeblajn bretarojn, la elektran kuirilon, lampojn, vazojn, manĝilaron, faldeblajn brakseĝojn kaj kuŝseĝojn, la pneŭmatajn matracojn kun pumpilo, litkovrilojn, dormosakojn kaj kusenojn. La hundo sidas sur mia sino dum la veturado kaj la dorsosako kun vestaĵoj estas sub miaj gamboj. Ĉiujn fojojn ni forgesas ion hejme, ĉu la necesejajn paperojn, ĉu sapon, ĉu la sandviĉojn, kiujn mi devas prepari la antaŭan vesperon.
- L – Sed, pri ĉio ĉi ni devis zorgi nur unufoje jare! Printempe. Poste jam ĉio estas surloke, kaj ni nur ĝuas la proksimecon de la naturo!

K – Ho, jes! Ĉiam la sama ĉirkaŭaĵo, la sama loko! Dum la aliaj povas veturadi al nekonataj lokoj, al la montaro, al la maro, al diversaj urboj, ni ĉiun printempon veturas al la kutima kampadejo. Kara, mi tre deziras, ke ni vendu ĝin! Mi skribas la anoncon.... Granda familia tendo estas vendata... jen, mi pretas! En tiu paĝaro troveblas multaj tendoj vendataj, kaj novaj, kaj uzitaj. Rigardu, tiu ĉi tendo ege similas la nian, kaj ĝi kostas sufiĉe multe. Ni povus vendi la nian, eble kontraŭ la duono de tiu ĉi sumo! Mi planas, ke el tiu





mono ni povos fine elspezi pri vera somerumado, en hotelo!

II. La sukcesa vendo

La geedza paro Ludoviko (L) kaj Karla (K) babilas kun la interesiĝantoj (I kaj J), kiuj alvenis al la hejmo de la geedza paro, por aĉeti la tendon.

I kaj J – Bonan tagon! Ni telefonis al vi hieraŭ, ke via familia tendo interesas nin.

K kaj L – Bonan tagon! Bonvolu enveni, ĉu kafon aŭ eble ion malvarman en tiu ĉi varma tago?

J – Ho, dankon, mi volonte akceptus ion malvarman.

K – Kaj por vi, sinjoro, kion mi povas doni?

I – Koran dankon, sufiĉos glaso da freŝa akvo!

J – Ĉu mi rajtas interesiĝi, kial vi vendas vian novan tendon?

L – Ĝi estas tre komforta kaj eĉ luksa tendo, sed ni pensis, ke ni prefere veturados jam sen tendo ien-tien. Ni jam eĉ mendis vojaĝon al la montaro.

J – Niaj gefiloj, ili estas 4- kaj 6-jaraj, ŝategas tendumi, kaj tiel ili havos pli vastan lokon!

I – Ili eĉ ĉi tien volis akompani nin!

K – Jen malvarma limonado por vi, sinjorino, kaj por vi la akvo. Vi povos aldoni pliajn glacikubetojn, ili estas en la apuda ujo!

J – Ho, dankon, la trinkaĵo bongustas! Ni estis babilantaj ĝuste pri tio, ke niaj infanoj multe ĝojas pri la tendo. Ĝi havas du dormoĉambrojn, laŭ via anonco, ĉu?

K – Jes! Sed vi povas rigardi ankaŭ la desegnaĵojn kaj fotojn pri ĝi.

L – Mi alportos la tendon!

J – (Rigardanta la grandan pakajon): Ĝi havas belan koloron! Mi deziris tendon ĝuste en tiu koloro! Blua, flava kaj verdeblua!

K – Tio estas nur la saketo, sed la tendo havas la samajn kolorojn! Rigardu, jen la desegnaĵo. Ĉi tie estas la enirejo, antaŭ ĝi la teraso. La tegmento tenas du stangoj. Ankaŭ kovrilon ni aĉetis por la teraso. La enirejon vi povas fermi per zipo, al kiu apartenas pend-seruro, kun kodoj. Ĉi tie estas fenestro kun reto kontraŭ la insektoj. La fenestron eblas fermi aŭ malfermi... Tiun internan parton ni uzis kiel kuirejon, kaj la alian kiel banĉambron. Inter ili estas nur simpla kurteno. En tiu vasta loko, post la enirejo, eblas lokigi ankaŭ seĝojn. Ni metis ĉi tien ankaŭ nian faldeblan vesto-ŝrankon,





en la kuirejo kaj banĉambro estas po unu faldebla bretaro...

J – Mirinde!

I – Ege bone ekipita tendo!

L – Tiujn aĉetis jam ni, sed ni volonte aldonos ilin al la tendo!

K – Tie, malantaŭe, troveblas la du dormoĉambroj.

J – Ha, tio por la infanoj! Ĉu ankaŭ vi havas infanojn? Kiom aĝaj?

K – Ne, ni ankoraŭ ne havas.

L – La dormoĉambroj fakte estas apartaj tendoj, kun pordoj kaj fenestroj. Ili havas propran plankon el mola materialo, kaj la supra parto estas nur reto. Oni povas pendigi ilin al la interna plafono de la tendo.

I – Fakte, tre bona solvo!

J – Ĉu en la ceteraj partoj ne estas planko?

L – Certe estas. En la vasteco de la tuta tendo, krom en la teraso. Tiu vasta planko, jen ĝi, iom videblas en la pakajo ties pli vasta, akvrezista materialo... Tiu ĉi malhelverda...

I – Vere bona kaj komforta tendo ĝi estas! Kiom la tuto kostas?

L – Ĉar ĝi estas preskaŭ tute nova, kaj ni aldonos kromajn aĵojn, ni pensas, ke ĉio ĉi valoras la 70 procentojn de nova tendo.

J – Ĉu ne eblas kontraŭ la duono?

L – Certe ne. Ni ne ŝatas marĉandi*... Sed pro simpatio al vi, ni konsentas je prezo de 65 procentoj de la nova. Jen la katalogo...

I – Bone. Konsentite. Ni aĉetas ĝin!



III. Pliaj demandoj por decidi

La edzo Ludoviko (L) kaj lia edzino Karla (K) babilas en sia hejmo, iun vesperon, somerfine.

K – Imagu, Ludoviko, Paŭla invitis nin por kelktaga somerfina ripozo!

L – Ho, interese! Kien kaj kiam? Kaj ĉefe, kial?

K – Nur por iom da komuna ripozado, babilado, dum la sekva semajnfino, ĉe la Granda Lago. Mi rakontis al ŝi, ke ni vendis nian grandan tendon, kaj ĉi-somere ni restis plej ofte hejme.

L – Sed ni ja somerumis, ni veturis al la montaro, al luksa hotelo! Ni pagis pro tio la monon, kiun ni ricevis pro la vendo de nia tendo.

K – Jes, fakte, sed tio daŭris nur kelkajn tagojn. Ni akceptu la inviton, Paŭla estas tre afabla amikino.

L – Jes, akceptu la inviton kara, sed mi ne povos kunveturi kun vi. La postan



Konversaciaj temoj

lundon mi rekomencos la laboron post la somera feriado. Bedaŭrinde mi devas resti hejme tiun dimanĉon por trarigardi miajn aferojn.

... **post unu semajno...**

L – Saluton karulino, bone vi aspektas, bele vi bruniĝis apud la lago! Kia estis la ripozo? Rakontu!

K – Estis ege bone! Paŭla kaj la edzo havas mirindan tendon!

L – Ĉu vi bone amuziĝis kun via amikino?

K – Jes, certe. Sed la tendo ne estis tia, kiel la nia estis. Ĝi estis iom malpli granda, kaj ankaŭ la starigo de la tendo okazis dum mallonga tempo. En ĝi estis same du ejoj...

L – Kion vi faris dum kvar tagoj? Kiel vi manĝis?

K – Ni ĉefe ripozis, sed ni ankaŭ veturis de unu ripozloko al la alia. La edzo de Paŭla havas ankaŭ ruldomon, ankaŭ tie eblas dormi, Paŭla kaj ŝia edzo tranoktis tie. En ĝi estas kuirejo kun forno, fridujo, estas eĉ duŝejo. Matene ni enpakis en la ruldomon la tutan tendon, kaj tiel ni pluveturis.

L – Do, vi ripozis en pluraj lokoj, ĉu? Kaj ĉiufoje necesis munti kaj malmunti la tendon, ĉu ne?

K – Jes, sed tiu muntado iris multe pli simple. La skeleto de la tendo funkcias per aero, oni devas pumpi aeron en ĝin, kaj la tendo jam staras. Ni bezonis por tio nur kelkajn minutojn.

L – Mi ĝojas, ke vi fine havis agrablan ripozon! Por la sekvonta jaro ni planos pli longan feriadon.

K – Mi pensas, ke ni aĉetu tian tendon, kiun havas Paŭla. Tiel nia feriado povas esti pli longa, kaj ni povos veturi al diversaj lokoj, vidi urbojn, montojn, lagojn... Estus pli interese!

L – Ho... Ni devas kalkuli, kiom tio kostas... La benzino, la prezo de la

lokoj por la tendoj, diversaj necesaj aĵoj por kuiri kaj manĝi, kaj ne laste la aĉeto de la nova tendo.

K – Jes, ni faru la kalkuladon!... Sed... eble prefere aĉeti ruldomon, anstataŭ tendo, por pli multe vojaĝi?

TASKOJ

1. Legu la unuopajn dialogojn, kaj rakontu (en via gepatra lingvo), pri kio ili temas.
2. Kie vi ŝatas ferii? Ĉu en hotelo, ripozdomo, privata apartamento, sindikata ripozhejmo, tendo, ktp. Faru vian liston!
3. Priskribu, kiel aspektis la tendo de la geedza paro! Ĉu vi povus desegni ĝin?
4. Faru liston pri la objektoj, kiuj (verŝajne) estis en la tendo de la geedza paro!
5. Faru 2 pliajn listojn pri objektoj necesaj aŭ nenecesaj en la tendo, laŭ vi.
6. Ĉu vi jam loĝis en tendo? Rakontu, kiel ĝi aspektis!
7. Faru liston de objektoj, kiuj estas la avantaĝoj kaj malavantaĝoj de ripozo en hotelo, apartamento, ligna dometo, ruldomo, tendo! Vi povas aldoni ankoraŭ pliajn ripozejojn al la listo!
8. Rigardu la bildojn: kio estas la diferenco inter la du tendoj?
9. Kiuj objektoj estus por vi bezonataj por feriado en tendo?
10. Kian tendon vi elektus por feriado a.) en montaro, b.) apud maro aŭ lago?
11. Kial volis vendi la edzino ilian tendon kaj kial ŝi volis denove aĉeti tendon aŭ ruldomon?
12. Rakontu pri via interesa feriado! Skribu detale, kie vi loĝas, kaj kial tio (mal)plaĉis al vi!
13. Konvinku vian parolpartneron, kial indas ripozi en tendo (aŭ ruldomo, aŭ luksa hotelo, aŭ ligna dometo, ktp)!



Vortklarigoj



Faldeblaj bretoj kaj ŝranko



Dormosakoj



Faldeblaj kuŝseĝoj



Faldeblaj brakseĝoj



Dorsosako



Stangoj por fiksi la tendon



Ruldomo



Pumpilo



Pneŭmataj (blovigeblaj) matracoj



Blovigebla tendo kun skeleto,
funkcia per aero

* **Marĉandi:** diskuti pri la prezo de io,
por aĉeti ĝin malpli koste.




El mia kolora vivo

Verkinto kaj desegninto: Pavel Rak



Kolorigu la suban bildon laŭ la supra! Nomu la objektojn, homojn kaj beston! – Kie ili estas? Kion ili faras? Kiujn vestaĵojn portas la homoj? Kiujn kolorojn havas la objektoj kaj bestoj? Kio okazas sur la bildo?





Mireille Grosjean

Legu kaj ordigu

(laŭ sugesto aperinta kadre de VEKI)

Metu la frazojn en ĝusta kaj racia vicordo.

La kamparano vendas la bananaron sur la bazaroplaco. Petro kaj Karlo enbuŝigas bananon. La bananaro maturiĝis sur sia arbo. Petro kaj Karlo maĉas kaj glutas sian bananon kaj koruse diras: Mmmmmm, la banano vere bongustas! Petro kaj Karlo senŝeligas sian bananon. La kamparano tranĉas la bananaron. Petro kaj Karlo aĉetas bananojn sur la bazaroplaco.

Jen la solvo. La bananaro maturiĝis sur sia arbo. La kamparano tranĉas la bananaron. La kamparano vendas la bananaron sur la bazaroplaco. Petro kaj Karlo aĉetas bananojn sur la bazaroplaco. Petro kaj Karlo senŝeligas sian bananon. Petro kaj Karlo enbuŝigas la bananon. Petro kaj Karlo maĉas kaj glutas la bananon kaj koruse diras: Mmmmmm, la banano vere bongustas!

Metante piedon eksteren, Petro konstatas, ke pluvas. Post la promenado Petro kaj la hundo revenas hejmen. Petro serĉas la rimenon de la hundo por ligi ĝin antaŭ la eliro. La hundo estas malseka kaj malsekigas la plankon de la domo. Estas la momento, kiam la hundo devas iri eksteren por pisi. Petro revenas sen la hundo al la interno de la domo por preni sian pluvombrelon. Petro vidas la dancon de la pisema hundo. Petro kaj la hundo promenadas ekstere en pluvo; pro la uzo de pluvombrelo Petro ne malsekiĝas. Petro kaj la hundo iras eksteren.

Jen la solvo. Estas la momento, kiam la hundo devas iri eksteren por pisi. Petro vidas la dancon de la pisema hundo. Petro serĉas la rimenon de la hundo por ligi ĝin antaŭ la eliro. Petro kaj la hundo iras eksteren. Metante piedon eksteren, Petro konstatas, ke pluvas. Petro revenas sen la hundo al la interno de la domo por preni sian pluvombrelon. Petro kaj la hundo promenadas ekstere en pluvo; pro la uzo de pluvombrelo Petro ne malsekiĝas. Post la promenado Petro kaj la hundo revenas hejmen. La hundo estas malseka kaj malsekigas la plankon de la domo.





Mireille Grosjean:


Pri Hans Christian Andersen (1805-1875) Du knabinoj primokas maljunan gaston

Andersen estis dano. Li verkis teatraĵojn, poemojn, sed ĉefe rakontojn, fabelojn.

Li multe vojaĝis kaj en tuta Eŭropo estis fama kaj akceptita kiel gravulo. Tamen en Danlando malpli; nur fine de sia vivo li ricevis taŭgan agnoskon pri sia talento. Dum sia vivo li estis ĉiam sola, kaj ne havis ian amrilaton. En sia vivofina periodo li povis esti gasto ĉe nobelulino, grafino, kiu havis grandan bienon, vilaon kun parko, kaj du filinojn. Bonvole legu pri la aventuroj de Andersen en tiu familio.

“Dum mi parolas pri la somera bienvivo de Andersen, mi povas menciigi anekdoton pri li, kiu estas kaj amuza kaj karakteriza por la senpereco de la poeto:

Ian someron li loĝis en dana bieno, kie interalie estis du vivgajaj junaj grafidinoj, kiuj faris al Anderson multajn petolajojn, ekzemple disŝutis porkharegojn en lian liton kaj metis ranidojn en lian lavujon. Foje la poeto ne povis




dormi pro tio, ke sub la lito estis lokita papago, kiu de tempo al tempo ekkriis: “Trankviliĝu, vi maljunulo!” Fine la koleranta poeto decidis sin venĝi.

Vestita en blanka subpantalono, ĉemizo kaj noktĉapo kaj kretita en la vizaĝo, li ian vesperon antaŭ la dormtempo kuŝiĝis, metis sin en la liton de unu el la junaj sinjorinoj por ludi fantomon, kiam ili eniros. La sinjorinoj venis, sed

anstataŭ rigardi al la litoj, kion Andersen estis atendinta, ili tuj komencis senvestigi sin. Andersen, kiu estis preskaŭ tro hontema, suferis terure. Subite unu el la junaj sinjorinoj faris rimarkon, kiu

supozigis, ke ŝi intencis ŝanĝi tre intiman tolaĵon. Nun estis tro multe al la poeto; tremante pro timo li flankentiris la antaŭkurtenon kaj rimarkigis sin. La sinjorinoj ekkriegis kaj rifuĝis. Andersen neniigite restis sola. La venontan tagon li deklaris sin malsana.”

El *Hans Christian Andersen, liaj vivo kaj verkoj* de Chr. Heilskov, eldono *Orienta Kuriero*, Hongkongo 1938.





La sorĉa kanto-mondo

La rubrikon preparas Małgosia Komarnicka,

ul. Kilińskiego 14/3, PL-59-300 Lubin, malgosia.junaamiko@gmail.com



Kanto akompanas nin ĉie... Ni volonte aŭskultas ĝin, ĉar ĝi helpas vidi kaj krei alimaniere la mondon, ebligas revii, aŭ transdoni niajn sentojn.

Gi ankaŭ helpas akiri pli bonajn rezultojn dum lernado, ĉar lernantoj, kantante, samtempe lernas, kreskigas sian emocian engaĝiĝon en la lerno-procezo. Sufiĉas nur ekkanti, kaj ili tuj memoras la kanto-vortojn. Tiamaniere la lernantoj plej bone kaj sugestie alproprigas al si la materialon de la leciono, ofte ne konsciante, ke ili ekzercas fremdan lingvon.

La laboro kun kanto havigas ĝojon kaj kontenton al la lernantoj, kaj do ni ne malhelpu ĉi tiun agrablecon de kantado dum la Esperanto-lecionoj.

Aŭtune, Jose de J. Campos Pacheco, el Kubo, la longdaŭra kunlaboranto de nia revuo *Juna Amiko* proponas al vi belan Kanton pri numeroj, bestoj kaj koloroj, el la libro *La Urso-Kurso*.

La muzikon vi povas elekti laŭplaĉe. Jose proponas ekz. brazilan sambon ...

La Urso-Kurso ampleksas tutan aron da helpmaterialoj kaj prezentas Esperanton kiel ilon kaj kiel propedeŭtikan lingvon. La lernantoj ekscias ankaŭ pri la E-kulturo. Ludoj kaj enigmoj estas integraj partoj de la kurso. La kurso ampleksas 18 kantojn. La elektitan kanton vi trovos en la dua leciono de la unua kajero. Pri la kolekto zorgis interalie Stephen Thompson (Esperanto Teachers' Association - 1998).



Kanto pri numeroj, bestoj kaj koloroj

Unu, mi kantas - saluton, la bestoj!

Kio la unu?

Unu estas kato bruna, nigra kaj oranĝa.

Du nun mi kantas - saluton, la bestoj!

Kio la du, do?

Du, du la tigroj estas belaj bestoj grandaj.

Unu estas kato bruna, nigra kaj oranĝa.

Tri nun mi kantas - saluton, la bestoj!

Kio la tri, do?

Tri, tri testudoj.

Du, du la tigroj estas belaj bestoj, bestoj grandaj.

Unu estas kato bruna, nigra kaj oranĝa.

Kvar nun mi kantas - saluton, la bestoj!

Kio la kvar, do?

Kvar la ranoj verdaj.

Tri, tri testudoj.

Du, du la tigroj estas belaj bestoj grandaj.

Unu estas kato bruna, nigra kaj oranĝa.

Kvin nun mi kantas - saluton, la bestoj!

Kio la kvin, do?

Kvin la fiŝoj ruĝaj.

Kaj kvar la ranoj verdaj.

Tri, tri testudoj.

Du, du la tigroj estas belaj bestoj grandaj.

Unu estas kato bruna, nigra kaj oranĝa.





Renée Triolle

Florence Nightingale

/najtingejl/ (1820-1910), pionira flegistino



De kelkaj monatoj dismultigās tra la mondo nova viruso, koronaviruso. Malsaniĝis tiom da homoj, ke multaj landoj devis rapide konstrui portempajn malsanulejojn.

Ekzemple en Londono (Britio), komence de aprilo, kronprinco Karlo inaŭguris portempan malsanulejon laŭ la nomo de Florence Nightingale. Kial li elektis ĝuste tiun nomon? Ĉar tiu britino pioniris en flegado kaj statistikado de la malsanoj. Ni iom retrorogardu al ŝia vivo.

Familio kaj juneco

Florence naskigis la 12-an de majo 1820 en brita familio, loĝanta en Italio, precize en Florenco (*Florence*), de kie ŝi ricevis la propran nomon. Ŝia familio

estis riĉa kaj edukita, kaj la knabineto ne vizitis lernejon, sed estis instruita hejme. Ŝi konis la francan, latinan, grekan, italan kaj germanan lingvojn, sed lernis ankaŭ filozofion kaj historion. Pro sia religio kaj kredo je socia programo, la gepatroj financis kuracajn servojn por la lokaj vilaĝanoj (memoru, ke en la 19-a jarcento ne ekzistis ŝtata aŭ privata asekuro). En 1837 ekestis epidemio pri gripo kaj Florence dediĉis sin al servo al malsanuloj “inspirita de dio”. En tiu epoko ŝi lernis matematikon.

Vojaĝoj kaj renkontoj

En la jaro 1844 ŝi renkontiĝis kun usona kuracisto Samuel Gridley Howe, kaj ŝi konvinkiĝis, ke junulino el la alta socio povas iĝi flegistino, do havi socian rolon, ne nur paradi dum baloj aŭ viziti la malriĉajn kamparanojn, kiuj laboras por la familio. En tiu epoko

Viajn respondojn bonvolu sendi al mi interrete ĝis la 30-a de oktobro 2020, kaj la desegnojn al la adreso: Europejskie Centrum Edukacji Międzynkulturowej, ul. Kołłątaja 26A, PL- 50-007 Wrocław, Polska.

Valorajn premiojn fondis pola organizajo: Europejskie Centrum Edukacji Międzynkulturowej (Eŭropa Centro de Interkultura Edukado), www.ecem.com.pl



Kantu kaj lernu!

Bonvolu sendi proponojn de viaj naciaj kantoj, por ke la legantoj de *Juna Amiko* havu eblecon ekkoni belajn kantojn el la tuta mondo.

Bonvolu respondi kelkajn demandojn

Ĉu la kato estas blanka aŭ malgranda?

Kia estas la kato?

Kie la katoj loĝas?

Kiom da tigroj estas belaj kaj grandaj?

Ĉu vi timas, kiam vi vidas verdajn ranojn? Kial?

Kiom da testudoj estas?

Ĉu vi volus havi testudojn hejme?

Kiom da fiŝoj estas? Kian koloron ili havas?

Desegnu la bestojn, kiujn vi ekkonis, kantante la kanton.



riĉuloj kuraciĝis hejme, nur malriĉuloj vizitis malsanulejojn. Ŝi tie konstatis la senprofesiecon de la flegistinoj. Ŝi ne nur konstatis, ke urĝas trejni kaj formi kompetentajn flegistinojn, sed ŝi multe pripensis kaj dokumentis.

De 1847 ĝis 1850 ŝi vojaĝis, ĉu por eskapi el la gepatroj, kiuj deziris edzinigi ŝin? Ŝi vizitis Grekion kaj Egiption. Ŝi interalie renkontis politikiston Sidney Herbert, kiu poste fariĝis vicministro dum Krimea Milito. En Prusio (nuna Germanio), ŝi konstatis en Kaiserwerth bonan kvaliton de la flegado. Tiu obstinega kaj persistema junulino konvinkis siajn gepatrojn, kiuj finfine permesis al ŝi trejniĝi kiel flegistino en Kaiserwerth (tiutempe nur religiulinioj prizorgis la malsanulojn, por servo al la homoj kaj dediĉo al Dio). De 1852 ĝis 1854 ŝi staĝis en malsanulejoj en Parizo kaj Londono: la staĝojn pagis ŝiaj gepatroj.

Krimea milito (1853-1856)

Rusio frontis Otomanan Imperion (nuna Turkio), kiun helpis Britio, Francio kaj Sardinio. 20% da soldatoj suferis pro ĥolero kaj disenterio (la homo konstante fekis, suferis pro lakso, sekve la epidemie rapide disvolviĝis). Komencis raportoj pri la milito – novaĵo en tiu epoko – gazetkorespondantoj. Sekve la tuta mondo sciis, kio okazas. En 1854 Florence kun grupo de 20 flegistinoj estis sendita al Turkio: multegis la mortantaj soldatoj, pro la vundoj, sed ĉefe pro tifo, ĥolero kaj disenterio, en aĉaj kondiĉoj: trois la homoj, ne estis kloakoj, mankis ventumado, do mankis la minimumaj higienaj kondiĉoj (iel kiel nun el la tendumejoj por migrantoj). Al tio Florence reagis per kreado de fonduso *Nightingale Fund* por rikolti monon kaj trejni profesiajn kaj kapablajn flegistojn. Pri tiu terura milito reagis ankaŭ Lev Tolstoj, skribinte tri *Rakontojn pri la sieĝo de Sebastopolo*, kiuj odoris je sango. En 1856 Florence, malsana, reiris al Britio kaj malpermesis al siaj patrino kaj fratino

eniri ŝian ĉambron, por eviti kontakton (transdono de la malsano per kontakto; same ni devis fari pro koronaviruso).

Posta kariero

Florence daŭre dediĉis sian vivon al flegado kaj ĉefe trejnado de kompetentuloj. En 1859 ŝi kreis faklernejon *Nightingale Training School*. En 1883 reĝino Viktoria donis al ŝi ordenon *Royal Red Cross*. En 1907 la Komitato de Ruĝa Kruco kreis ordenon *Florence Nightingale*. Estas interese rimarki, ke Ruĝa Kruco (ankaŭ Ruĝa Krescento* por islamanoj) fondiĝis pro reago de nearmeano ĉe batalkampoj: sviso Henri Dunant post la batalo de Solferino en 1859 konstatis, ke ĉiuj militkampoj zorgis nur pri siaj propraj vunditoj. De tie venis la ideo krei en 1863 internacian senpartian organizon La Ruĝa Kruco, kaj antaŭpuŝi apartan traktadon de militkaptitoj (1864, Konvencio de Ĝenevo).

Dum pluraj jaroj Florence estis malsana, kuŝis, sed daŭre laboris, ĉefe pri mastrumado de la malsanulejoj.

Eĉ se amaso da institucioj, lernejoj, monumentoj, filmoj, libroj aŭ televidoj omaĝis al Florence Nightingale, ni memoru, ke ŝi estis ne nur pioniro pri higieno kaj flegado, sed ankaŭ modelo por la virinoj, kiuj kuraĝas liberiĝi de gepatroj, modo kaj kutimoj, por antaŭeniri sian vojon.



Statuo de Florence Nightingale en Londono.

*) Krescento: figuro havanta formon de lunarko.



La fino kronas la verkon



La rubrikon prizorgas Mónica Molnár

La kronvirova tempo ne forpasis tiom rapide, kiel oni esperis. La vivo ja ne plu estis kiel antaŭe, tamen, iom post iom, oni rekomencis vivi...

Hmm, ne kiel antaŭe, sed preskaŭ. La Ulidoj ĝojkriis kiam ili denove povis iri en la lernejon, revidi la amiketojn kaj plengorĝe ridi kunludante kun ili. Nu, ja, Avinjo denove pravis! Ne tiom malbonas tiu lernejo! La izoliĝo ne estis facila por multaj Uloj kaj Ulidoj, ĉar ili preferis esti en amika rondo ol inter la kvar muroj, sed ili komprenis la bezonojn pri sin-protektado. Tamen, la malfacila periodo helpis al kelkaj Ulidoj malkovri novaĵojn, vidi la mondon per aliaj okuloj. Ekzakte tio okazis ekzemple al Scivolemulido! Li ĉiam scivolis kio estas

en la subtegmentejo, sed neniu povis respondi al li kaj li neniam havis tempon por mem esplori tion. La izoliĝo donis al li kaj la tempon, kaj la okazon iri supren. Kiam li revenis en la salonon, li havis brilajn okulojn sur polvokovrita kapeto kaj ion en la mano.

Li tenis la objekton kiel trezoron.

– Kion vi trovis supre? – demandis la aliaj.

– Mi ne certas, sed mi pensas, ke ĝi estas muzikinstrumento! Supre estis tro malhele por bone vidi, sed laŭ mi ĝi similas al... al trumpeto! Atendu, mi tuj provos ĝin... AAARGGGHHH...

– Ĉesu! – petegis la aliaj. – Prefere venu kaj aŭskultu kun ni la rakonteton de Cloé ['kloe'], eble ĝi donos al vi bonajn ideojn.



**Cloé de Bernardini:
La tamtamo kaj la
monstro**

En la granda bazaro oni povas aĉeti preskaŭ ĉion. Jano tuj estis ravita de bela, brila tamtamo. Li tuj volis aĉeti ĝin.
– Kiom ĝi kostas? – demandis li.
– 20 monerojn. – diris la vendisto.
– Prenu la monon, mi aĉetas ĝin. – diris Jano.

– Ne! Mi volas ĝin! Ĝi estas por mi! – diris nova aĉetanto.
– Aaaa! Monstro!! – kriis Jano kaj forkuris.
– Vi ne rajtas fari tion! – diris la vendisto al la monstro.
– Pardonu min! – diris la monstro. – Mi amas tiun ĉi tamtamon...



- Bone, bone, vi povas havi ĝin, sed restu ĝentila kun la aliaj! - diris la vendisto.
- Euh... ĉu mi povus havi ankaŭ tiun ĉi belan, ruĝan pomon?
- Jes, mi donas ankaŭ ĝin al vi.



- LA LA LA LO LO LE LE LI LI LA!!! LAAA LO LE LIIII!!! JUPI!!!
- Neee!!! Ĉesu! Ĉesu bruegi! Lasu min vivi trankvila! - plendegis la najbaro, kiu tute ne aprezis la novan akiron de nia monstreto.



- Mi havas ideon! Mi aĉetos fiŝon, kiu aŭskultos mian muzikon.
Dirite, farite, kaj la fiŝo ŝajnis bonfarti en sia akvario aŭskultante la muzikon.



Pro la ekzercadoj, la muziko de la monstreto pli kaj pliboniĝis. Jam ne estis nur la fiŝo, kiu ĝuis lian muzikon. Multaj personoj venis por aŭskulti lin.



Liaj amikoj fieris pri li kaj kuraĝigis lin prezenti sian muzikon dum koncertoj. Li faris grandan muzikan turniron ĉirkaŭ la mondo. Kaj kiu scias, eble eĉ Jano ĉestis iun lian koncerton...


Apenaŭ finiĝis la rakonto, Scivolemulido ĝoje reprenis la trumpeton por...
- Neeee! Bonvolu ne trumpeti!
- petegis timeme la aliaj
Ulidoj.
- Sed... sed kial? -
demandis Scivolemulido.



- Ankaŭ mi ŝatus ĉirkaŭiri la mondon kaj fari koncertojn, kiel la monstreto! Vi ĉiuj povus eĉ veni kun mi!

- Bone, se vi volas fari kiel li! - diris ĝoje Pacemulido. - Ĉu vi memoras kiel li komencis?
- Ĉu per la aĉeto de la fiŝo? - demandis timeme Scivolemulido. - Aŭ...
- Aŭ prefere per multaj ekzercadoj! - diris la aliaj. - Kaj vi havas eĉ pli da ŝanco ol la monstreto, ĉar ni certas, ke Muzikemulido volonte helpos vin kaj kunludos kun vi! Kaj kiam vi jam sukcesos bone akompani kelkajn kantojn, ni eĉ venos kunlabori, kunkanti kun vi. Ni faros belegajn koncertojn, pasigos kune mirindajn momentojn! Vi vidos, ke ankaŭ vi ŝatos tion!
- kuraĝigis lin Ulideto. - Jes, sed... Ĉu oni rajtas jam organizi grandajn koncertojn? - scivolemis Scivolemulido. - Pro la kronviruso? Ne, ankoraŭ ne, sed tio donas al ni ĝuste la tempon por la bezonata ekzercado. Ek al la muzik-aventuro por ke ni estu pretaj ĝustatemp! Ĝis ba-la-la-Idaŭ! 🎵





La oreloj de la kuniklo

Afrikkuba legendo

La kuniklo estis komence tre malrespekta. Ĝi plendis pro ĉio, al ĝi ne plaĉis esti enkaĝigita, nek ke iu malpurigis ĝin. Bone, ĝi ĝemis ankaŭ pro la malgrandeco, kiun la naturo estis doninta al ĝi.

Iun tagon ĝi tre ĝemis, kaj bonkora kaj saĝa maljunulo, kiu aŭdis ĝiajn ĝemojn, diris: „Kuniklo ĝemema. Se vi akiros aglan flugilon, ruĝegan kiel el fajro, leonan dentegon, aŭdu bone, de leono, kaj serpentan ovon, ha, de venena serpento, mi duobligos vian grandecon. Ne demandu kiel! Mi aranĝos.”

Do, la kuniklo foriris kaj iom meditis. Kaj, jen! Ĝi suprensaltis monteton, kaj per kukurba kano ĝi alvokis la aglon. La aglo transflugis Atlantikon kaj alvenis. „Kiel vi kuraĝas voki min, kuniklo! Ĉu vi ne vidas, ke mi loĝas tre malproksime?” – „Okazas, ke mi bezonas unu el viaj flugiloj, kiu donos grandecon al mi. Unu flugilon ruĝan kvazaŭ sango. Tiel ĉiuj respektos min.”

La kompatema aglo cedis al li sian dekstran flugilon, kaj la kuniklo gaje forkuris kun ĝi. La fajroruĝa kaj sangoruĝa flugilo certe makulis la okulojn de la kuniklo.

La kuniklo revenis al la monteto kaj vekis per la kukurba kano la serpenton. „Kial

vi kuraĝas veki min, kuniklo! Ĉu vi ne vidas, ke mi estis dormanta?” – „Okazas ke mi bezonas unu el viaj ovojn, kiu donos grandecon al mi. Ovon de venena serpento. Tiel ĉiuj respektos min.”

La kompatema serpento cedis al li unu el siaj ovojn, kaj la kuniklo gaje forkuris kun ĝi.

La kuniklo vokis per la kukurba kano la leonon. Tiu eliris el sia kaverno muĝante: „Ĥĥĥrrr, ĥĥĥrrr, ĥĥĥrrr!” Ĝi marŝis mal-


rapide kaj furioze rigardis la kuniklon: „Kuniklo, kion vi volas, kial vi faras tiom da bruo?” – „Vokas vin mia magia haro, blanka haro, kiu sonas unu fojon tage. Mi volas unu el viaj dentegoj.”

La leono, timante la misteran sonon, forprenis unu el siaj dentegoj kaj donis ĝin al la kuniklo. Tiam la kuniklo, tre gaja kaj feliĉa, vizitis la saĝan kaj bonkoran maljunulon, parolante per milda voĉo: „Jen mia promeso. La sangruĝa flugilo de aglo, la akra dentego kaj la ovo de la

venena serpento.” La maljunulo tuŝis sian barbon kaj ridetis vide al la kuniklo. „Se vi kun tia grandeco sukcesis tion, kio okazus, se vi havus la grandecon de kapro aŭ eĉ de kamelo? Vi estus, amiko mia, la skurĝo de la kreitaĵo.”

La kuniklo furioz-igis, kaj ĝiaj oreloj longiĝis. Kaj la maljunulo ne ĉesis diri al ĝi: „Estu saĝa kaj feliĉa kun tia grandeco! Kun viaj oreloj, sufiĉas...”

Elhispanigita de
Jozefo de Jesús Campos Pacheco





La 6-a Esperanto-staĝo en Métabief

La aranĝo okazis de la 23-a ĝis la 29-a de aŭgusto 2020 en montareca pejzaĝo de ĵurasa regiono, en la vilaĝo Métabief, proksime de la svisa limo.

Organizis ĝin la klubo de “Esperanto Chalonnais”, sub la gvidado de Anne-Marie Ferrier, jam la sesan fojon. Tiu ĉi jaro estos memorata kiel la jaro de la tutmonda pandemio Kovim-19 (koronvirsusa malsano).

Ni loĝis en montara junulara gastejo *Les Sapins de l'Amitié* (La abioj de Amikeco). La direktoro Djemel Zeffane bonvenigis nin kaj donis informojn pri la domo kaj pri la striktaj kondiĉoj pro la koronvirsuso. Ni devis uzi maskojn, krom dum manĝado kaj instruado.

La unua vespero komenciĝis per la bonveniga aperitivo kaj prezentado de la ĉeestantoj. La aranĝon partoprenis dudek tri esperantistoj el Francio kaj unu el Svislando. La programo konsistis el matenaj kaj antaŭvesperaj Esperanto-kursoj kaj posttagmezaj ekskursoj al diversaj lokoj. La vesperoj estis dediĉitaj al prelegoj aŭ ludoj. Per ekskursoj la partoprenantoj povis malkovri interesan regionon, promeni en la ĉirkaŭaĵo, bicikli al diversaj partoj en tiu angulo, situanta proksime al Svislando. Agrablaj por rigardi estis matenaj sunleviĝoj, vesperaj sunsubiroj kaj unufoje eĉ ĉielarko beligis la horizonton.

Plej fluajn parolantojn Renée Triolle instigis al legado de diversaj tekstoj kaj diskutado. Ni traktis temojn pri rubaĵoj, kafo, topinamburo, pandemio, atomcentraloj, sekreta vivo de lavmaŝinoj, Marjorie Boulton, judoj kaj holokaŭsto, indiĝenaj lingvoj en Sudameriko, mikrokredito ktp. Ne mankis gramatika ekzercado. Luc Allemand kaj Jacqueline Poux gvidis kurson por progresantoj. La libroservo proponis

Esperantajn librojn. Andreo Grossmann prezentis kajerojn de TAKE pri konstruado.

Post la bona kaj abunda tagmanĝo ni povis elekti diversajn ekskursojn. Interesa estis vizito de la mezepoka kastelo *Fort de Joux*, transformita al fortikaĵo. Ĝi havas la plej profundan puton (120 metroj) en Eŭropo. Ne malpli interesa estis vizito al groto de *Vallorbe* en Svislando. En Svislando ni vizitis ankaŭ la muzeon *Baud* de mekanikaj muzikiloj. Kelkaj el ili estas veraj unikaĵoj.

Alia vizito gvidis nin al la fromaĝejo *Marcel Petite*. *Fort Saint Antoine* estas malnova militfortikaĵo, transformita al kelo por maturigado de la fromaĝo *Comté*. Ĝi estas unu el la plej ŝatataj fromaĝoj. En la “Domo de la rezervejo” sur areo de 500 m² estas instalitaj interagaj ekspozicioj, dediĉitaj al faŭno kaj flaŭro de la ĵurasa montaro. En proksimeco oni povas promeni ĉe la lago de *Remoray* kaj de *Saint-Point*, kiuj estas bone rimarkeblaj el belvidejo en alteco je 940 metroj. Kelkaj el ni biciklis al pli foraj lokoj. En Métabief ni vizitis fromaĝejon de *Mont d'Or*, kie oni povas aĉeti diversajn fromaĝojn kaj aliajn regionajn produktaĵojn.

Ĵaude ni havis la plezuron akcepti viziton de Mireille Grosjean kun ŝia amikino. Mirejo regalis nin per ĉokoladaj bombonoj “Merci”. Venis ankaŭ du instruistoj: Emmanuel Desbrières kaj Alexandre André. Ili instruas en francaj lernejoj kaj rakontis al ni pri siaj spertoj pri enkonduko de Esperanto, pri interŝanĝoj kun aliaj lernejoj kaj pri vojaĝo kun lernantoj al Slovenio.

Vespere Renée Triolle prelegis pri la interesa vivo de Victor Lebrun, kiu estis franca esperantisto kaj iama sekretario de Leo Tolstoj. Alia ŝia prelego temis pri famaj virinoj en Esperantujo. Luc Allemand rakontis kaj per bildoj ilustris sian vojaĝon per biciklo ĉirkaŭ la Nigra Maro. Alian interesan (kvarmonatan) vojaĝadon per ĉevalo prezentis Nathalie Rigault. Ni ankaŭ ĝuis ludadon de liro fare de Luc Allemand.

Post longa tempo sen fizikaj renkontiĝoj ni povis ĝui agrablan semajnon en bona familia etoso.


Liba Gabalda



Luiza Carol

Fascinaj popolaj mitoj

**Pri la libro “Ĉinaj mitoj”,
kompilita de Yuan Ke,
ilustrita de Su Xinping,
esperantigita de Li Baofa kaj Xu
Wanfen, Ĉina Esperanto-Eldonejo,
Pekino 1992, 95 paĝoj.**



kaj la granda ovo rompiĝis. El ĝi la malpezaj kaj puraj materioj malrapide flirtsis supren kaj formis ĉielon, dum la pezaj kaj malpuraj plumbes falis malsupren kaj formis teron.”

Min tre emociis la tuta unua ĉapitro pri la genezo fare de Pangu, kaj la legado venigis en mian menson multajn demandojn: Ĉu iu ajn aŭdacas niatempememfide aserti, ke li aŭ ŝi komprenas ĝisfunde la misteron de la genezo? Ĉu la opinioj de la plej famaj nunaj sciencistoj ne povus esti malakceptataj de ontaj

sciencistoj post multaj jarcentoj? Ĉu la ŝanĝo de perspektivo koncerne la genezon de la universo signifas proksimiĝon aŭ malproksimiĝon al la ĝusta kompreno? Kaj kiel oni entute difinu “ĝustan” komprenon? Nepovante firme respondi al tiaj demandoj, mi faris al mi mem pli simplan demandon: Ĉu tiu mito emociigas min? Mi senhezite jesis. Kaj similajn reagojn mi havis ankaŭ legante aliajn samspecajn mitojn de la libro.

En multaj mitaj rakontoj aperas admirindaj protagonistoj, kiuj klopodis plibonigi la vivkondiĉojn de la homaro. Unu el la plej impresaj tiaj herooj estas Fuxi [prononcu: “fuhsi”], kies agadojn oni priskribas tiel:

“Fuxi feliĉe vivis kun la homoj multe da jaroj. Li resumis ĉion en la universo per ok simplaj plensignifaj signoj, inventis reton laŭ aranejaĵo, per kiu li lernigis al la homoj fiŝi kaj ĉasi kaj donacis al la homoj fajron tondre estigitan kaj instruis al la homoj kuiri manĝaĵon. Krome li kreis ankaŭ muzikilon, nomatan *Se*, kaj komponis melodion *Jiabian*. Jam en la epoko de Fuxi ekradiis aŭroro de la homa kulturo.”

Multaj mitoj prezentas edukvalorajn rakontojn, pere de protagonistoj kun forta memorinda personeco. Bela ekzemplo pri tio estas la rakonto “Jingwei ŝtopis la maron”. Tiu mito temas pri diino, kiu droniĝis en la maro, kaj poste ŝia spirito fariĝis birdo, nomata “Jingwei”. Onidire ekde tiam la birdo senĉese ĵetas ŝtonetojn en la maron kun la intenco ŝtopi ĝin. Kortuŝa estas la dialogo inter la primokanta

Tiu libro estas kolekto de antikvaj belaj mitoj el Ĉinio. Ili konserviĝis laŭ diversaj variantoj en diversaj partoj de Ĉinio, pere de folkloraj rakontoj kaj kantoj, ofte pere de famaj beletraĵoj fare de elstaraj poetoj aŭ prozistoj, inspiritaj de folkloro, pere de belaj pentraĵoj aŭ skulptaĵoj kaj ankaŭ pere de sciencaj verkoj fare de folkloristoj kaj historiistoj.

En multaj el tiuj mitoj aperas malnovaj kredoj, ligitaj de la manieroj, laŭ kiuj la antikvaj gentoj en Ĉinio klopodis respondi al demandoj pri naturaj fenomenoj. Tiaj mitoj restas allogaj ankaŭ niatempememfide, pro iliaj metaforaj signifoj kaj arta valoro. Jen kelkaj belegaj ekzemploj: “Pangu kreis la mondon”, “Nüwa kreis la homaron”, “Nüwa flikis la ĉielon” k.a. La titoloj mem klarigas pri la signifoj de la supremenciitaj mitoj.

Senspire mi legis la grandiozan komencon de la mirinda unua ĉapitro, pri la kreado de la mondo fare de la giganto Pangu:

“Antaŭ tre tre longe, kiam la ĉielo kaj la tero ankoraŭ ne estis apartigitaj unu de la alia, la universo aspektis kiel ĥaosa bulo, simila al granda ovo. Ĝuste en tiu bulo naskiĝis Pangu, prapatro de la homaro. Iun tagon post 18 000 jaroj li subite malfermis la okulojn, vidis nur mallumon kaj sentis fortan sufokiĝon. Li kaptis, ne sciante de kie, hakilegon kaj forte hakis la mallumon antaŭ si. Ekaŭdiĝis tondra bruo,



potenca maro kaj la persistema birdeto. Jen bela fragmento el tiu signifa dialogo:

“Jingwei respondis, flugante super la maro: ‘Mi nepre ŝtopos vin, eĉ se mi devas tiel fari dek milionojn da jaroj, cent milionojn da jaroj, ĝis la fino de universo, la lasta tago de la mondo!’

‘Kial vi tiel forte min malamamas?’

‘Ĉar vi forkaptis mian junan vivon, kaj vi certe senkompate forkaptos la vivon de pli multaj senkulpaj homoj.’”

Similan persistemon oni renkontas ĉe la maljunulo el la rakonto “Montotransloko fare de Malsaĝa Avo”. Iusence la persistemo de ĉi tiu protagonisto estas eĉ pli kortuŝa ol tiu de la fabela birdo, ĉar nun ne temas pri dio aŭ pri iu fantazia senmorteca estaĵo, sed pri normala homo. Verŝajne oni nomis lin “Malsaĝa Avo”, ĉar li estis entuziasme revema, malsimile al alia maljunulo, kiun oni nomis “Grandaĝulo Saĝa”, ĉar tiu havis praktikan pensmanieron. Malsaĝa Avo decidis forigi du montojn, kiuj ĝenis lin, ĉar ili baris la vojon antaŭ lia domo. Liaj filoj kaj nepoj konsentis elfosi teron el la montoj kaj forĵeti la elfositaĵojn en maron. Ili bezonis pli ol duonan jaron por iri ĝis la maro kaj reveni, sed Malsaĝa Avo ne rezignis pri sia ideo. Grandaĝulo Saĝa primokis lin, dirante, ke li estas tro maljuna kaj malforta por plenumi tiom grandan revon. Sed jen kion Malsaĝa Avo respondas:

“Kiam mi mortos, miaj filoj daŭrigos la laboron; kiam ili mortos, estos miaj nepoj, kaj poste iliaj filoj kaj nepoj, kaj tiel plu senfine. La du montoj ne plu povos kreski, kaj ni laboros penege generacion post generacio. Kial do ni ne povos ilin ebenigi?”

Grandaĝulo Saĝa trovis neniun vorton por respondi al tiom granda optimismo. La vortoj de Malsaĝa Avo iel atingis la orelojn de la Ĉiela Imperiestro, kiu estis kortuŝita de la persistemo kaj la optimismo de la maljunulo kaj tial ordonis al siaj gigantaj subuloj translokigi la du montojn. La rakonto havas neatenditan finon:

“Unu (monto) estis transportita al Shuodong, kaj la alia al Yongbei. Tiel la du montoj origineigitaj staris respektive en du malsamaj lokoj.”

Do temas fakte pri unu el la plej belaj legendojigitaj de geografiaj lokoj. Min impresis

tre profunde la eduka mesaĝo de tiu mito.

Alia mito kun neatendita finajo, enhavanta belegan edukan mesaĝon, estas “Rakonto pri Yi kaj Chang’e”. En tiu rakonto interplektiĝas multaj agadfadenoj kaj iliaj signifoj estas diversflankaj. Sed la fino fokusiĝas nur sur la rilaton inter la granda heroo Yi kaj lia edzino Chang’e. La paro estis en la komenco dioj, sed perdis sian diecon post kiam Yi mortigis naŭ el la dek sunoj, varmegigintaj la teron. Tio estis nur unu el liaj multaj heroecaj agadoj, pro kiuj la homaro estis ege danka al li. Sed dum la homoj estis tre kontentaj havi unu solan sunon, kiu sufiĉis al ili, la Ĉiela Imperiestro koleriĝis, ĉar ĉiuj sunoj estis fakte liaj filoj. Tial Yi kaj Chang’e estis punitaj fariĝi homoj. Laŭ la instigo de sia edzino Yi alfrontis grandajn danĝerojn por havigi por ili ambaŭ eliksiron, kapablan igi senmortaj la homojn, kiuj englutus ĝin. La kvanto de la eliksiro sufiĉis ĝuste por du homoj, sed kiu englutus la tutan kvanton, tiu povus fariĝi feo kaj vivi eterne en la ĉielo. Chang’e perdidis sian edzon kaj englutis la tutan kvanton, por fariĝi feino. Poste ŝi ne kuraĝis iri al la Ĉiela Palaco, kie la dioj malrespektus ŝin pro ŝia malnobla perfido. Tial ŝi iris al la dezerta Luna Palaco, kie ŝi ekloĝis sola. Jen kiel la aŭtoro priskribas la solecon de la egoisma edzino:

“Ju pli longe ŝi loĝis, des pli ŝi sentis solecon. Ŝi ekpensis pri la plezuro de la familio kaj la boneco de la edzo. Kiel bone estus, se ili ambaŭ glutus la eliksiron kaj eterne vivus sur la homa mondo.”

Aliflanke Yi, kiu dum sia tuta vivo amis la homojn pli ol la diojn, restis definitive homo, atendanta maljunecon kaj morton, sed ĝuanta la grandan respekton kaj dankon de la homaro. Soleca li ne estis, sed la perfido de Chang’e profunde suferigis lin. La aŭtoro priskribas poemece lian malĝojon:

“La indigno, malespero kaj malĝojo, kvazaŭ venenaj serpentoj implikis lian koron.”

Ne nur tiu fascina rakonto, sed ankaŭ multaj aliaj el la libro incitas la leganton mediti pri la rilatoj inter homoj kaj la naturaj fenomenoj kaj entute pri la loko de la homo en la universo.

Mi rekomendas tiun valoran libron al legantoj ĉiuaĝaj.

Legu kaj ĝuu



Rubrikestro: Małgosia Komarnicka,
ul. Kilińskiego 14/3,
PL-59-300 Lubin,
Pollando, rete:
malgosia.
junaamiko@gmail.com



Legado dum la pandemia periodo... (daŭrigo)

Kiam printempe ni eksciis pri la koronavirusa pandemio, ni certe ne pensis, ke ĝi daŭros ankoraŭ multajn longajn monatojn...

Plimulto el ni devis ŝanĝi siajn kutimojn, limigi societajn renkontiĝojn, pli da tempo pasigi hejme...

Tial ni ne forgesu pri libroj. La libroj estas parto de arto kaj la arton ni bezonas same kiel oksigenon. Sen arto ne estas sano! Psikologoj ne havas dubon, ke nia prospera vivo dependas de tio, kiumaniere ni helpas al ni kun niaj emocioj. En tiu helpo gravan rolon ludas arto kaj do legado de libroj. La libro estas kiel medikamento. Ĝi plenumas gravan rolon: plifaciligas travivaĵojn, helpas ekregi niajn emociojn, trovi solvojn, ordigas informojn, permesas interŝanĝi opiniojn kaj rigardi similajn problemojn. Legante ni do povas unue travivi vivon "virtuale" kaj poste jam reale.

Interparoloj pri libroj certe helpas al ni pli bone travivi tiun kruelan pandemian tempon.

Laste mi denove tralegis la genian libron "La Pesto" de Alberto Kamuso kaj dank' al ĝi mi povis kompari nian nuntempan situacion kun tiu, antaŭ dekoj da jaroj. Mi povis akiri distancon, vidi ĝustajn proporciojn, komparante diversajn sintenojn kontraŭ danĝero.

Mi rekomendas legi librojn, reveni al tiuj jam iam tralegitaj, ĉar la libro estas nun la plej malmultekosta kaj la plej efika medikamento. Legado kaj komuna pridiskutado reduktas nivelon de streso kaj timo, pligrandigas nian humoron kaj plifortigas nian imunecon.

Klubo de bona libro



Legu, legu, legu!

Biblioteko de *Juna Amiko* por junuloj kaj infanoj kreskas danke al viaj proponoj. Bonvolu sendi viajn proponojn de libroj, kiuj montras pozitivajn valorojn (ekzemple toleremon, amikecon, apogon al malpli fortaj homoj), helpas kompreni vin mem kaj aliajn, kaj ebligas adaptiĝi al nia iom malgaja realeco. La proponojn kun la titolo, aŭtoro kaj mallonga rekomendo bonvolu sendi al la supra adreso, aldonante la noton: Biblioteko de *Juna Amiko*.




Rekomendo

Por Biblioteko de *Juna Amiko* mi rekomendas la libron „Urseto”, kiun verkis podlaĥia poeto Adam Siemieńczyk. La libro estas kvarlingva: pola, Esperanta, angla kaj germana. La libron eldonis Bjalistoka Esperanto-Societo kune kun Podlaĥia Libraro Łukasz Górnicki en Bjalistoko.

La libro estas kortuŝa, ilustrita fabelo pri amikeco. Ĝia heroo estas pluŝa urso, kiu instruas pri recikligado.

La vorto recikligado signifas reutiligon en produktopecoj. Tamen pli frue oni devas la rubaĵojn klasifiki laŭ la materialoj, el kiuj ili estis produktitaj... Niaj rubaĵoj estas grandparte recikligeblaj materialoj. Multajn el ili oni povas ankoraŭ utiligi, anstataŭ transporti en ĉiam pli grandajn stakojn. Legante la libron vi ekscios, kion signifas la frazo: „Ne serĉu min sub mia malnova pluŝa formo. Estas grava nur tio, ke ni plu povas ludi kune“.



Ekkonu mian landon pere de ĝia legendo

Konkurso ne nur por junaj legantoj.

Rubrikestro: Małgosia Komarnicka.



Ĉi-numere mi proponas viziti la landon de la ĉefredaktoro de nia belega revuo *Juna Amiko*, Stano Marček.

Li estas fama esperantisto, kiu kunlabore kun Germana Esperanto-Biblioteko en la urbo Aalen kreis interretan “Aŭskultejon”. En ĝi vi povas aŭskulti kaj libere elŝuti sonlibrojn kun fabeloj, poezio kaj prozo, kaj ankaŭ kantojn en Esperanto (“Aŭskultejo” estas trovebla ĉe la interreta adreso t1p.de/auskultejo1).

Kio allogas min al Slovakio?

Mi do invitas vin al Slovakio, slovake Slovenská Republika. Ĝi estas lando en Mezeŭropo kaj apartenas al pluraj gravaj internaciaj organizaĵoj. Slovakio estas sendependa ekde la 1-a de januaro 1993 kaj antaŭe ĝi estis parto de Ĉeĥoslovakio. De la 1-a de januaro 2009 ĝi uzas eŭron.

Unue per kelkaj informoj konatiĝu pri la lando de Stano Marček, la lando, kiu





ne havas aliron al maro. Klopodu trovi la menciitajn lokojn en la teksto sur la mapo, poste tralegu la legendojn kaj faru konkursajn taskojn.

Slovakio estas dividita en ok regionojn, nomitajn laŭ iliaj ĉefurboj:

Bratislava – la regionon valoras viziti pro ĝiaj opero kaj historio de la multkultura ĉefurbo de la lando. Ĝi estas la unua ĉefurbo en la mondo, kiu limas kun du landoj, Aŭstrio kaj Hungario. Al la ĉefurbo de Aŭstrio, Vieno, de Bratislavo estas nur 60 kilometroj, kaj ambaŭ urboj situas ĉe la rivero Danubo.



Nitra – la regiono allogas pro elegantaj palacetoj kaj riveraj fosadoj.



Trenčín – en la regiono Trenčín oni



povas rigardi tipan urban arkitekturon kaj majestajn kastelojn.

Trnava – la regiono estas fama pro dekoj da preĝejoj kaj unuaklasa vino.



Banská Bystrica – en la regiono oni povas malkovri mezepokajn ministajn urbojn kaj virgajn arbarojn.



Žilina – en la regiono estas paradizo por amantoj de montaroj kaj tradicioj.





Košice – en la regiono troviĝas la plej belaj grotoj kaj bongusta vino.



Prešov – en la regiono troviĝas la plej multaj lignaj preĝejoj.



La klimato de Slovakio estas modera, oni distingas kvar sezonojn, la plej malvarma monato estas januaro kaj la plej varmaj monatoj estas julio kaj aŭgusto.

Slovakio havas la plej malnovajn, la plej bonajn kaj mirindajn kuraclokojn en Mezeŭropo. Tio estas interalie: Piešťany (minerala akvo kaj sulfura marĉo), Rajecké Teplice (ekskluziva antikva etoso), Turĉianske Teplice (esceptaj sanigaj kuracoj) kaj ununuraj je eŭropskalo du



La slovak
prezidantino
Zuzana Čaputová

kuraclokoj: Sklené Teplice („Parenica” – vaporbano en la ŝlimo) kaj Trenĉianske Teplice (rara turka ŝlimo).

Slovakio estas emocie reaganta popolo. Kun emocioj ili travivas ĝojajn, sukcesajn, malĝojajn kaj ankaŭ malsukcesojn. Ili estas sinceraj, amikaj, gastemaj kaj bonkoraj.

Slovakio estas lando de kontrastoj, sed ĉiuj lokoj estas proksimaj. El urba aglomeraĵo oni povas rapide atingi montarojn. Slovakio estas juna, tre progresiga lando. Dum preskaŭ 30 jaroj de ĝia ekzisto okazis dinamikaj ŝanĝoj, konstante ekestas novaj firmaoj, konstruaĵoj, pliboniĝas la vivo de la loĝantoj, sed samtempe oni gardas tradiciajn valorojn. El Slovakio devenas multaj kapablaj, talentaj kaj inventemaj homoj, kiuj atingis mondajn sukcesojn en la kampoj kulturo, scienco kaj sporto: Jozef Maximilián Petzval (eltrovinto de fotografobjektivo), Jozef Murgáš (eltrovinto de sendrata telegrafo), Ján Bahýl (eltrovinto de helikoptero), Štefan



La prezidenta palaco en Bratislava





Banič (eltrovinto de paraŝuto), Aurel Stodola (prilaboris teorion de termikaj cirkuladoj de la turbinoj vaporaj kaj gasaj) kaj multaj aliaj.

Slovakio estas riĉa lando pro mondaj kulturaj kaj naturaj heredaĵoj. En 1993 en la Liston de Monda Heredaĵo de Unesko estis enskribitaj tri objektoj: Spišský hrad (Burgo de Spiš, supre), Banská Štiavnica kaj Vlkolánc, kaj en la jaro 2000 oni aldonis ankoraŭ historian urbon Bardejov, en 2008 lignajn preĝejojn de la slovakaj parto de Karpatoj, kaj en 2009 la historian urbon Levoča (la suba bildo).

Homoj en Slovakio vivas kongrue kun la naturo, kun estimo kaj humileco al la antaŭuloj, kutimoj kaj tradicio. Tio respegulas la iaman vivstilon, folkloran kulturon pere de dancoj, kantoj, konstruaĵoj, kutimoj, moroj kaj metioj.

Tradicia kuirarto de montaraj regionoj estas fama danke al fromaĝoj kaj laktaj produktaĵoj. Valoras gustumi pikantajn manĝaĵojn el brasiko kaj anseraĵoj, *lokše* (terpomaj flanoj) kaj *trdelník* (korforma kuko kun truo en la centro). Nacia slovakaj plado estas bryndzové halušky



(terpomaj nokoj kun ŝaffromaĝo). Enlandaj senalkoholaj trinkaĵoj kiel *Vinea* kaj *Kofola* sukcese konkuras kun amase disvastigitaj trinkaĵoj de mondaj firmoj.

Nepre vizitu Slovakion, ĉar atendas vin tie multaj interesaj surprizoj.

Legendoj

Stano Marček proponas tri legendojn. Unu estas pri la fama slovakaj nacia heroo Juraj Jánošík. En 1944 li aperis sur la slovakaj bankbileto de 500 kronoj kaj en 1947 sur la 2-krona monero. La 26-a de marto estas la Tago de Jánošík. Alia legendo estas pri filoj de la reĝo Svatopluk. Legante la trian legendon ni ekscios, ke diablo scipovas konstrui grandegan kastelon.

Juraj Jánošík, la slovakaj heroo

Juraj Jánošík naskiĝis la 25-an de januaro 1688 en Terchová. Liaj gepatroj estis Martin Jánošík kaj Anna Cesneková. Li havis fratojn Jan, Martin kaj Adam, kaj pli junan fratinojn Barbora. Li fariĝis legenda rabisto, simila al la angla heroo Robin Hood.

Plej probable li partoprenis en la ribelo de Ferenc Rákóczi. En 1708 li revenis al sia vilaĝo, sed baldaŭ li eniris en la imperiestran armeon. Tie li ekkonis la estron de rabista grupo Tomáš Uhorčík, kaj fariĝis rabisto. Kaj de tiu momento komenciĝis lia rabista agado, kiu daŭris ĝis la printempo 1713. La 17-an de marto 1713 en Liptovský Mikuláš Jánošík estis pendumita. Probable unu el liaj kunuloj perfidis lin.

Jánošík, alveninte al la rabista grupo, rapide fariĝis estro de la grupo. La rabistoj loĝis en slovakaj montaraj. Ili priŝteladis nobelojn kaj disdonadis la rabaĵojn al malriĉaj homoj. Ili neniam priŝtelis simplajn homojn. Tiel Jánošík fariĝis popola heroo.



Laŭ popolaj legendoj Jánošík ricevis de feino magian zonon, kiu faris lin nevundebla. Alia legendo prezentas Jánošík, kiu gajnis supernaturajn fortojn danke al bastono, zono kaj ledaj piedvestoj (krpcoj).

Laŭ la legendo li devis esti kaptita per ruzo. Maljunulino ĵetis sub liajn piedojn pizojn kaj li falis. Tiam kaptis lin la jam atendantaj kaj kaŝitaj soldatoj. Antaŭ la pendumado oni proponis, ke li fariĝu kapitano en la imperiestra armeo, sed li respondis: "Se vi bakis min, do vi ankaŭ formanĝu min!" kaj li mem saltis al hoko sur ŝnuro kaj mortis, pendante je ripo.

Pri Jánošík vi povas ne nur legi librojn, sed ankaŭ rigardi multajn filmojn. En 1921 aperis la unua filmo pri li "Jánošík". Ĝi estis muta. La filmo estis financata de Usono kaj enskribita en Liston de Monda Heredaĵo de Unesko. En 2011 estis finita filmserio de pola-slovaka-ĉeĥa kunlaboro "Vera historio pri Jánošík kaj Tomáš Uhoročík".

Tri branĉetoj de la reĝo Svatopluk

La granda reĝo de Moravio havis tri filojn. Ĉiu el ili deziris fariĝi reĝo post la morto de la patro, kvankam laŭ la tradicio nur la plej maljuna filo povos ricevi la kronon. Tamen la pli junaj fratoj ankaŭ deziris regi la landon.

Svatopluk petis alveni siajn filojn kun branĉetoj. Sekve li ordonis, ke ĉiu el ili rompu sian branĉeton. Tion ili tre facile faris. Tiam la reĝo petis, ke nun la filoj plektu la tri branĉetojn kaj denove ili provu

rompi ilin. Ili ne povis fari tion. Vidante tion, la reĝo diris al siaj filoj: "Miaj filoj, se vi unuigas kaj helpas unu la alian, vi estas fortaj kaj neniu malamiko venkos vin, tiel, kiel vi ne povis rompi tiujn tri branĉetojn. Tamen, se vi kverelos, vi estos venkitaj kaj via reĝlando estos prenata de viaj malamikoj." La filoj de Svatopluk ĉesis kvereli kaj post la morto de la patro la nova reĝo fariĝis la plej maljuna el ili.

Interkonsento kun diablo

Iun tagon Marko alvenis al Oravo. Li estis ravita, vidante ĉirkaŭaĵon, kaj li ekpensis: "Bone estus ĉi tie ekloĝi, eĉ se la domon konstruus diablo". En la sama momento la diablo aperis. Ĝi proponis konstrui al Marko kastelon dum sep tagoj, kondiĉe, ke Marko post 70 jaroj donacos al li sian animon. Marko konsentis. Li malpacience atendis finon de la konstruo de la kastelo.

Tamen ju pli proksime estis la fino de la konstruado, des pli multe Marko timis pri sia animo. Li komencis preĝi al Dio, por helpo savi la animon. La sepan tagon diablo kunportis lastajn ŝtonegojn por fini la laboron kaj tiam kokerikis virkoko, anoncante novan okan tagon. Furioza diablo, kiu ne plenumis la promeson, ĵetis lastan ŝtonegon en la riveron kaj malaperis. La ŝtonego estas en la rivero ĝis nun kaj nomiĝas "La roko de Marko".

LA KONKURSA TASKO estas jena: Desegnu aŭ pentru bildo(j)n, kiu(j) prezentos slovakajn legendojn. Kreu 20 demandojn pri la tuta teksto de la rubriko "Legu kaj Ĝuu". La konkurso taskon bonvolu sendi kun viaj nomo, adreso kaj indiko "Konkurso – legendo" ĝis la 30-a de oktobro 2020 al la adreso Europejskie Centrum Edukacji Międzykulturowej, ul. Kołłątaja 26A, PL- 50-007 Wrocław, Polska.

La valorajn premiojn fondis Eŭropa Centro de Interkultura Edukado (pole: Europejskie Centrum Edukacji Międzykulturowej).



Mireille Grosjean

Kian stultan ideon mi havis... Mi volis forpuŝi aŭ mortigi tiujn danĝerajn fi-insektojn!

Ni loĝis en Zuriko, en luita apartamento kun balkono. Nia filino estis iom pli ol unujaraĝa, ŝi staris, paŝis, iom kuris, kaj interesiĝis pri multaj aferoj, kiuj situis je ŝia alteco de infaneto.

Foje mi vidis ŝin sur la balkono, en bela suna tago. Tie estis barilo, kompletigita per kanotuboj*. Mi observis, ke la kanotuboj estis loĝejo de insektoj, fakte de abeloj, kaj mi iam vidis, ke mia filino tre zorgeme karesis la felon de la harokovritaj dorsoj de tiuj bestoj. Kompreneble mi ektimis. Mi timis, ke ili iam pikos la infaneton, eble eĉ en la buŝo,




ĉio estas aparte danĝera. Ŝia buŝo estis ekzakte en la alteco de la supra parto de la kanoj, do de la elirejo de la insektoj. Mi pensis: ĉu mi forprenu la kanojn? Ĉu mi malpermesu al la filino iri al la balkono? Ĉu mi uzu ian kemian substancon por mortigi tiujn ne deziritajn kunloĝantojn?



Mi instruis en lernejo. Tie mi havis kolegon, kiu instruis biologion kaj kiu bredis abelojn en sia hejmo. Do mi pensis: mi invitu lin kaj konsultu lin. Li venis al mia balkono kaj observis. Tuj li trankviligis min. Li klarigis, ke tiuj sovaĝaj abeloj ne estas ekipitaj por piki. La faka nomo estas *osmia*. Ili loĝas individue en

tiaj kanotuboj. Mi demandis, ĉu mi povus forpreni la kanojn kaj instali ilin en la ĝardeno, for de la ludteritorio de mia filino. Li diris: Ne faru tion! Se vi farus tion, la abeloj restus ĉe la balkono kaj serĉus sian domon vigle kaj arde; tio devas ne okazi. Do mia filino plu karesis la sovaĝajn abelojn kaj estas fakto, ke neniam okazis incidento en tiu kontakto inter la infaneto kaj la abeloj.





Renato Corsetti

Poemo pri la gepatra lingvo

Tanzanio estas lando en Orienta Afriko, kaj tie oni parolas bantuajn lingvojn.

Tiu, kiu estas vaste parolata de ĉiuj en Tanzanio kaj en aliaj najbaraj afrikaj landoj, estas la svahila.

La svahila havas vastan tradician literaturon kaj abundajn poemajn formojn, ankoraŭ nun uzatajn kun rimaranĝoj tre variaj. Unu el la tradiciaj rim-sistemoj estas en la ĉi-sekva poemo, kiu en la originalo



*Titi la mama litamu, hata likiwa la mbwa,
Kiswahili nazimu, sifayo inayofumbwa,
Kwa wasiokufahamu, niimbe ilivyo kubwa,
Toka kama chemchemu, furika palipozibwa,
Titi la mama litamu, jingine halishi hamu.*

*Lugha kama Kiarabu, Kirumi, na Kingereza,
Kwa wingi zimeratibu, mambo ya kupendeza,
na mimi nimejaribu, kila halikujifunza,
lakini sana na bubu, nikizisema nabezwa,
Titi la mama litamu, jingine halishi hamu.*



havas 25 strofojn, el kiuj ni tradukis nur du. Temas pri poemo, kies originala titolo estas *Kiswahili*, la svahila, kaj laŭdas la gepatran lingvon. La aŭtoro estas Shaaban Robert (1909 – 1962), rigardata kiel la nacia poeto de Tanzanio en la 20-a jarcento. Informoj pri li en Vikipedio, sed ne en Esperanto: https://en.wikipedia.org/wiki/Shaabab_bin_Robert

La versoj konsistas el 16 silaboj, dividitaj en duonversoj de 8 silaboj, kiuj rimas tiel: a-b/a-b/a-b/a-b/a-a en la unua strofo kaj c-d/c-d/c-d/c-d/a-a. En la süahila sistemo rimo konsistas el simila lasta konsonanto kaj vokalo, ekzemple **domo** kaj **amo** kaj ne kiel en Esperanto **domo** kaj **aromo**, en kiuj la lastaj du vokaloj estas samaj.

*La patrina mamdo dolĉas, eĉ se estas ŝi hundino
La süahila lingvo plaĉas, ravas min ĝi pro rafino
kiuj daŭre pri ĝi klaĉas, miru, belas ĝi sen fino
Fonte ŝprucas, onde bruaĉas, spitas haltojn per ruino
La patrina mamdo dolĉas, kun plezuro ni ĝin maĉas*

*Aliaj lingvoj: latina, angla, franca kaj araba
riĉas nun en lum' vitrina, lernis mi per ago raba
tamen malgraŭ vol' obstina, estas lerno pezo traba.
Tenas min muto rutina, mia diro nur silaba
La patrina mamdo dolĉas, kun plezuro ni ĝin maĉas*



Laure Patas d'Illiers:

Eta fratino

Mi nomiĝas Dora. Mia plej bona amikino estas Tereza. Ni estas en la sama klaso. Ĉiutage post la lernejo, ni kune eliras kaj revenas hejmen.

Je la kruco de vojoj, ŝi iras dekstren al sia strato kaj mi iras maldeskstren, preter la muro de la tombejo, ĝis mia strato. Kelkfoje ni invitas unu la alian por kune ludi.

Lastan monaton Tereza ricevis etan fratinton. Ŝi invitis min por vidi ŝian fratinton. Ĉiuj ripetis, ke la bebo estas tre bela kaj kara. Tereza tre fieris pri sia eta fratino.

Hejme mi petis de Paĉjo ke ankaŭ mi havu etan fratinton. Li ŝultrumis kaj respondis, ke tio ne okazos. Mi memoras, ke li faris same, lastan someron, kiam mi petis pri ferioj ĉe maro.

Eble ĉio tio okazos, kiam Paĉjo denove trovos laboron. Ĉiun tagon, kiam mi estas en la lernejo, li serĉas laboron per sia komputilo, kuŝante sur la sofo de la salono. Kiam Panjo revenas de sia laboro, ŝi diras, ke li pigras kaj ili kverelas. Tiam mi iras en mian ĉambron.


Lastan semajnon, post kiam Tereza kaj mi disiĝis, mi paŝis preter la muro de la tombejo. Tie mi vidis hundon.

Mi kaj la hundo staris kaj rigardis unu la alian. Ĝi estis malgranda kaj blanka, kun nigra nazopinto kaj nigraj okuloj.

Mi diris "He hundo! Ĉu vi havas etan fratinton?" La hundo respondis "Ne", en la hunda lingvo.

Mi paŝis hejmen kaj la hundo sekvis min.

Kiam Paĉjo vidis la hundon, li koleris. Mi kun ploro diris "Ĝi estu mia amiko! Ĝi



nomiĝos Ŝuŝu!" Paĉjo diris "Nu, ne ploru. Ni vidos, kion diros via patrino".


Kiam Panjo revenis, ŝi diris "Kial ne? Se ĝi manĝas niajn restaĵojn, ĝi kostos nenion". Poste ŝi diris al Paĉjo: "Vi havas liberan tempon la tutan tagon, vi promenigos ĝin". Paĉjo ne respondis.

Nun Ŝuŝu estas mia hundo. Ĝi dormas sur tapiŝo en mia ĉambro. Post la lernejo ni kune ludas. Ĝi pleje ŝatas ludi kun pilko. Kiam mi foriras al la lernejo Ŝuŝu kuŝiĝas ĉe Paĉjo. Li ne plu grumblas pri ĝi.

Hieraŭ vespere Paĉjo rakontis, ke li promenigis kun Ŝuŝu, kiam alparolis lin Sinjorino Kavan. Ŝi estas najbarino de ni. Ŝi diris, ke tiu hundo apartenis al unu el ŝiaj luantoj, malsana maljunulino, kiu mortis lastan semajnon. Post la morto la hundo restis en la apartamento. Sinjorino Kavan forigis ĝin de la apartamento. Ŝi venigis ĝin apud sian hejmon, sed la venontan tagon la hundo fuĝis. Sinjorino Kavan diris, ke ŝi tre kontentas, ke ni prenis la hundon. Ŝi diris, ke ni rajtas konservi ĝin por ĉiam.

Hodiaŭ, kiam ni kune iris hejmen, Tereza rakontis al mi pri sia eta fratino. Ŝi diris al mi, ke la bebo nur dormas kaj krias. Mi rakontis al Tereza pri Ŝuŝu. Ŝi tre interesiĝis kaj volis vidi ĝin. Mi invitis ŝin en mian hejmon. Ni kune ludis pilkon kun Ŝuŝu. Kiam ŝi foriris, Tereza diris al mi:

"Mi preferus havi hundon ol etan fratinton. Vi bonŝancas!"



Rubrikestro:
Elena Nadikova,
Esperanto-klubo “Betuleto”
Lernejo/Ŝkola 56,
pr. Traktorostroitelej, 38
RU-428028 Ĉeboksari, Rusio
lena_esperto@mail.ru



“VEKI-ĜU” venkas koronaviruson...

Saluton, karaj legantoj!

Finiĝis neordinara somero 2020, kiun ni spertis la unuan fojon en nia vivo. Pandemio... Tutmonda memizolado, korona viruso...

T iuj vortoj iĝis, bedaŭrinde, jam kutimaj por ni ĉiuj. Estis nuligitaj multaj gravaj eventoj. Homoj tutmonde devis resti hejme. Esperantistoj bedaŭris pro planitaj, sed neokazintaj Esperanto-eventoj. Tamen vivo en Esperanto-medio ne haltis. Aranĝoj “foriris” al la reta media-spaco. Gravaj ĉefaj kunvenoj okazis virtuale, ekzemple, UK, IJK kaj aliaj.


Ne restis flanke ankaŭ ILEI – Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. Ĝi organizis sian ĉiujaran ĉefan kunvenon de la 25-a ĝis la 31-a de julio 2020. La aranĝo nomiĝis VEKI – Virtuala Esperanto-



Konferenco ILEI. La retan platformon speciale kreis por la evento la slovaka enterpreno “Esperanto kaj Interreto” – E@I. 350 personoj el 60 landoj el kvin kontinentoj aliĝis al la 53-a Virtuala Esperanto-Konferenco ILEI.

VEKI havis temon “Interlingvistiko kaj Esperanto en Universitatoj”. Por la aranĝo estis ellaborita speciala tempoplano. Ĝi konsideris, ke la partoprenintoj loĝas en diversaj terglobaj horzonoj. Tial la programeroj estis dividitaj je 3 blokoj-sesioj.

Ĉiu tago havis sian propran temon: Inaŭgura Tago, Tago de la Komitato, Tago de lingvoj, Tago de la ĉeftemo –





“Interlingvistiko kaj Esperanto en Universitatoj”, Tago de de la Ligo, Pedagogia Tago, Konkluda Tago kun AMO-seminario (Aktivula Maturigo).

Certe, en fokuso de la konferenco estis tagoj kun la ĉeftemo kaj pedagogiaj programeroj. Dum ili alternis enhavriĉaj kaj interesaj prelegoj, prezentadoj kaj vivaj diskutoj. La partoprenintoj traktis diversajn gravajn temojn por Esperanto-movado: Interlingvistiko kaj Universitato; Esperantologio, Instruado de Esperanto kaj Esperanto-strategio en diversaj altlernejoj. La konferencanoj konatigis kun la agado de la laborgrupo de la ILEI-komisiono pri universitata agado. *Do, ILEI invitas ĉiujn interesigantojn aliĝi al tiu interesa kaj tre utila agado!*

Dum la Pedagogia Tago la VEKI-anoj traktis diversajn demandojn kaj temojn

AMO 64
Malfermo

"Niaj Fakaj Asocioj levas sin:
la rolo de la Fakaj Asocioj en la
nuntempo de la pandemia epoko"

Stefan MacGill
9-an de majo 2020

uea

pri instruado – la ĉefa zorgo de ILEI kiel monda Esperanto-organizo. Interesiĝantoj povis detale ekscii pri strukturo kaj agado de ILEI, kuntekste de la monda Esperanto-movado, kaj spekti la Komitat-kunsidon de la Ligo. Ankaŭ konferencanoj sekvis podiajn diskutojn pri programo de EIT – Esperanto Instruista Trejnano, pri ĉefaj eldonoj de ILEI: *Internacia Pedagogia Revuo* kaj *Juna Amiko*. Pripensoj pri aktualaj mondaj problemoj vekis analiz-



Ĵurnalistino sidas ĉe la komputilo de la ILEI-prezidanto Mireille Grosjean kaj faras intervjuon, dum kameraisto filmas. Temis pri la ŝtata franclingva svisa televido.



senalaĵoj de Muzaiiko: Veronika Pleĉ kaj Robert Zorčič

adon kaj diskutojn. Dum la Tago de Lingvoj estis prezentitaj 8 diversaj lingvoj, okazis interesa diskuto kun la kunlaborantoj de la radioelsendoj MUZAIKO, la partoprenintoj konatiĝis kun lingvaj kafejoj.

La 26-an de julio la VEKI-anoj festis la naskiĝtagon de Esperanto. La partoprenintojn surprizis tri belaj koncertoj. AMO-seminario fokusigis la partoprenintojn sur diversajn demandojn pri eksteraj rilatoj de la monda Esperanto-movado; pri la roloj, taskoj kaj respondecoj de instruistoj tra la mondo. La organizantoj ne forgesis ankaŭ diversajn historiajn eventojn, gravajn por la homaro.

Artaj programeroj diluis seriozecon de la konferenco. Deklamado, kantado, muzikludado iom ripozigis kaj amuzis la partoprenantojn. Koncertis famaj muzikistoj: Miguel Fernandez, Ralph Glomp, Amira Chun, Joël Muhire, Mikael Bronstejn, Anjo Amika, Pál Gajdos, Perla Mielo, Ĵomart kaj Nataŝa, Kajto, Fransoazo, JoMo.

Dum Gastronomia Rondo dezirantoj povis lerni kuiru tipajn pladojn de diversaj popoloj kaj nacioj.

Sportumado ankaŭ ne mankis. La partoprenintoj povis ekzerciĝi, ekzemple en japana jogo, prezentita de la Prezidantino de ILEI Mireille Grosjean.

VEKI finiĝis per la kutimaj konkludoj, priprenoj pri ĝiaj rezultoj, atingoj kaj mankoj, kaj ĝenerale pri paŝoj kaj per-

spektivoj de ILEI. Do, konkludu ankaŭ ni en nia rubriko: **neniu koronaviruso, eĉ COVIM 19 mem, kapablas venki Esperanton! Ĝi estas vivplena, aktiva kaj perspektivriĉa lingvo por justa kaj bona estonteco! Ĉu vi nun certas pri tio, niaj karaj legantoj? Do, VEKI-ĜU, LERNU ESPERANTON KAJ ĜUU ĜIN!**

ILEI kore dankas ĉiujn organizantojn, kontribuantojn kaj partoprenintojn de la 53-a

Virtuala Esperanto-Konferenco de ILEI - VEKI!

Por lernemuloj:

Karaj legantoj, ekde tiu ĉi numero nia rubriko Interkultura Mondo proponas por lernemuloj (dezirantoj/progresantoj kaj ne nur) iom ekzerci siajn lingvokonajn pri Esperanto. Bonvolu fari post la legado kelkajn taskojn laŭ via plaĉo kaj lingvonivelo.

Nivelo 1. Rerakontu la tekston (ĝian parton) laŭ la alineoj.

Nivelo 2. Respondu la demandojn:

1. Kia estas plena nomo de la ĉefkunveno VEKI?
2. Kiam okazis VEKI?
3. Kiom da homoj aliĝis al VEKI?
4. Kiom da ĉeftemoj de VEKI vi memoras? Nomu ilin.
5. Kiom da diversaj programeroj vi povas nomi laŭmemore?

Nivelo 3. Esprimu vian senton pri virtuala ILEI-konferenco VEKI.



Inaŭgura malferma parolado de VEKI, Mireille Grosjean.

Armenaj tapiŝoj

Estetika percepto de realeco, belarta kreo de homo, realiĝas per diversaj tipoj de arto.

Dum jarcentoj armenoj ekkreis multajn ĉefverkojn de monda arto en diversaj sferoj: muziko, arkitekturo plastika, aplika kaj aliaj.

Multsignifan lokon en dekor-aplika sfero okupas tapiŝteksado.

Armenoj uzis tapiŝojn kiel kovrilojn, sternaĵojn, kurtenojn, por beligi kaj varmigi la loĝejojn, kaj ankaŭ kiel sonzolibilojn.

Dum arkeologiaj foslaboroj en Karmir Blur, apud Erevano, kune kun aliaj teksilaĵoj estis trovitaj ankaŭ fragmentoj de tapiŝoj.

Laŭ armenaj, arabaj kaj aliaj mezepokaj fontoj (7-a jarcento) Armenio distingiĝis per alttaksitaj tapiŝoj.

Vizantiano Simon Majistro informis, ke bulgaroj en la jaro 814, dum sia kuratado al Frankio, kiel kaptajon aneksis ankaŭ alttaksitajn armenajn tapiŝojn.

En komenco de la 10-a jarcento membro de la araba kalifeja ambasadejo,



kronikisto Ibn-Fadlun, atestis, ke planko de granda tendo de la caro Almas (Bulgaria Kama-Volga carejo), kiun enhanceblis pli ol 1000 homojn, estis kovrita per armenaj tapiŝoj.

La araba kronikisto Muhamed Bar-Jagjan atestis, ke inter donacoj, senditaj en la jaro 911 de Armenio al la kalifo Muhtadir, estis 7 armenaj tapiŝoj, unu el ili havis dimension 100 m². Por teksi ĝin oni bezonis 10 jarojn.

Armenaj komercistoj monopoligis vendadon de tapiŝoj en okcidenta Eŭropo.

Venecia vojaĝanto de la 13-a jarcento Marko Polo, kiu trairis Armenian Kilikion, menciis, ke en urboj Sebastia, Konia kaj Kesaria armenoj kaj grekoj teksis la plej belajn kaj luksajn tapiŝojn en la mondo.

Pentraĵoj de armenaj tapiŝoj troviĝis kaj en armenaj mezepokaj miniaturoj (komenco de la 9-a jarcento) kaj en bildoj de okcidentaj pentristoj (Ĝotto, Bellini, Rubens, Rembrant kaj aliaj).

En Viena muzeo estas konservita tapiŝo de la jaro 1202, ĝia majstro-tapiŝteksisto Kirakos



Banaceci kunmetis al ornamaĵoj de tapiŝo skribon per armenaj literoj, kiu informis pri la dato, loko de produktado kaj la nomo de la teksisto.

Armena nomo de senvilfaca tapiŝo “karpet” eniris en multajn lingvojn de eŭropaj popoloj.

Vorto “karpet” unue estis menciita ĉe eŭropanoj en dokumento de la jaro 1295, dum prirabo de ŝipo, veturanta el Marselo al Ajas (Armena Kilikia).

Laŭ imago de la araba geografo de la 9-a jarcento Abu-Avna, nomo de la vilfaca tapiŝo “ĥali”, “ĥaliĉa” aperis de la nomo de la armena urbo Karin (Erzerum), kiun araboj nomis Kalikala – urbo de tapiŝoj.

Armenaj tapiŝoj disvastiĝas per altaj kvalitoj de farboj, fadenoj kaj teksaĵo. Oni uzis kaj naturajn kaj kemiajn farbojn.

Ĉefe disvastiĝis “drak-tapiŝoj” (*dragon carpet*), armenlingve “*viŝapagorg*”, flortapiŝoj kaj tapiŝoj kun geometriaj figuroj.

“Draktapiŝoj” kutime estis sufiĉe grandaj, 3m x 7m, kaj randa parto havis 4 kolorojn: ruĝan, bluan, kaŝtankoloran kaj eburkoloran. Ĉefa koloro estis helruĝa, kiun oni ricevadis el ruĝaj vermoj “*vordan karmir*”. Por draktapiŝoj estas tipa kunigo de kreskaĵaj kaj bestaj motivoj, sed centran parton ĉiam okupas unu el la ĉefaj herooj de armenaj mitoj kaj legendoj: drako



(“*viŝap*”). Multaj el la mezepokaj armenaj tapiŝoj nun troviĝas en muzeoj de Eŭropo kaj Ameriko.

Elitaj klasikaj “draktapiŝoj” konserviĝas en Berlina, Londona, Estergoma, Budapeŝta, Nov-Jorka, Vaŝingtona kaj aliaj muzeoj.

Lida Elbakyan

Magiaj ciferoj

Kalkulu la aĝon, se vi konas la grandecon de la piedoj!

Aldonu du nulojn al la piedmezuro, ekzemple 2600.

Subtrahu la jaron de la naskiĝo.

Al la rezulto aldonu la nunan jaron.

Rigardu la rezulton: la du lastaj ciferoj indikas la aĝon!



Renée Triolle


Kiel kontakti unu la alian?

Depost marto, la mondo forte ŝanĝiĝis. Pro la koronaviruso multaj el ni devis resti hejme kaj grandaj eventoj estis nuligitaj.


Esperantistoj estas grandaj amantoj de eventoj: kongresoj, klub-kunvenoj, amikaj renkontiĝoj kaj pinte de ĉio, la Universala Kongreso de UEA. Kelkaj el tiuj estis nuligitaj, kiel ekzemple la 13-a Mezorianta Kunveno, planita por Çeŝme en Turkio. Sed esperantistoj delonge uzas la reton por kontakti unu la alian. Tre rapide ili trovis manierojn organizi renkontiĝojn pere de la reto, t. e. per virtualaj eventoj.

AMO virtuala

Inter la unuaj por fari tion estis la konstante progresanta serio de AMO-seminarioj, kies celo estas Akivula Maturigo, t. e. trejnado. La 62-a seminario estis la lasta, kiu kunvenigis homojn fizike. Tio okazis en Aŭklando, Nov-Zelando, en januaro 2020. Post tio okazis retaj seminarioj 63, 64, 65 kaj 66 kun 67 planata por oktobro. Se la pandemio malfortiĝos, ni esperas,



La rubrikon prizorgas:
Stefan MacGill



ke AMO 68 okazos hibride, t. e. du-takte – kaj fizike kaj en la reto. Tio okazos en la kulturcentro Greziljono, en la centra Francio. La seminarioj 63, 64, 65 kaj 67 okazis aŭ okazos danke al la teknika prizorgo de IREA, la Landa Asocio de UEA en Irano, kiu prizorgis kaj pagis la Zom-aliron (Zoom). AMO kaj UEA ŝuldas al ili grandan dankon.

Monda Fest' kaj la Kontinentaj Tagoj

Niaj plej grandaj kongresoj devis fariĝi virtualaj. Ĉiuj el ili neatendite brile sukcesis fari tion. La 105-a Universala Kongreso ne povis okazi en Montrealo, Kanado. La espero estas, ke oni povos okazigi tion en 2022. La Kongreso





de la instruistoj (ILEI) ne povis okazi en Kebekurbo, Kanado. Ilia reta kongreso daŭris plenan semajnon, sub la nomo VEKI (Virtuala Esperanto-Kongreso de ILEI). Same ILEI esperas okazigi sian kongreson en Kebekurbo en 2022. Unike, VEKI okazis en du tempo-

blokoj, tiel ke loĝantoj en ĉiuj kontinentoj (krom eble Oceanio) povis partopreni en konvenaj horoj. Ankaŭ IFEF (fervojistoj) kaj UMEA (medicinistoj) kaj sendube aliaj Fakaj Asocioj transigis siajn kongresojn al reta plenumo. La junulara asocio TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo), plena je kapablaj junaj komputistoj, realigis sian Kongreson (IJK) per la reto, anstataŭ la planita fizika kongreso en Nederlando.

Ĉiuj kreis brilajn alternativojn, kaj UEA starigis kongresan semajnon, kadre de la

aŭdaca Monda Fest', reta kunvenado, kiu ekis en junio kaj daŭras ĝis septembro, kun plenŝtopita programo. Ene de la Monda Fest', ĉiu kontinento havas sian tagon. En aŭgusto okazis la Tago de Eŭropo,

kun prezentoj de deko da pli aktivaj asocioj. Plia programo estis forumo kun parolantoj el kelkaj eŭropaj asocioj. Restis tempo por liberaj diskutoj kaj muzikaj momentoj.

Neniu scias, kiomlonge la pandemio restos inter ni, kaj kiam eblos revenigi la kongresojn al fizika formo, por ke esperantistoj denove renkontu unu la alian. Sendube nia

sperto fortigas la emon fidi je komputikaj solvoj. Estas atendebla sekvo, ke ĉiu fizika kongreso havos per-retajn formojn, por ke homoj el ĉiu eĉ plej fora mondoparto povos virtuale partopreni.



LA ORA NOMBRO

Internacia Kongreso Universitato

Universala Esperanto-Asocio

FRANÇOIS LO JACOMO
FRANCO

VK.MONDAFEST.NET

VETURADO TRA LA INTERPLANEDA SPACO

Internacia Kongreso Universitato

Universala Esperanto-Asocio

CARLOS SPINOLA
HIERANJO

VK.MONDAFEST.NET

Universala Esperanto-Asocio

Komunikaj teknologioj en indigena aktivismo

VIRTUALA KONGRESO DE ESPERANTO

VK.MONDAFEST.NET

MANUELA BURCHIELLA
RUMANTIO, SKOTLANDO

VIRTUALA KONGRESO DE ESPERANTO

uea

PENNY VOG
AUSTRALIO

STRATEGIO POR ENKONDUKI ESPERANTON EN LERNEJOJ

VK.MONDAFEST.NET

Universala Esperanto-Asocio

La kolera manĝo, leciono de ĉiuj danĝeroj

VIRTUALA KONGRESO DE ESPERANTO

VK.MONDAFEST.NET

MIREILLE CROSEAN
SUISLANDO

Virtuala tago tujmunde

ESPERANTO

Charlotte, Ana, Eulax (Eule), Mireille, Jana Suna, Mung Bai (Felixa)

Universala Esperanto-Asocio

Infanrajtoj konkrete, nia-lerneje

VIRTUALA KONGRESO DE ESPERANTO

VK.MONDAFEST.NET

MONIKA MOLNAR
SUISLANDO

Virtuala Malferma Tago de UEA

25-an de aprilo 2020

Speciala prelego Burunda kafo

Jérémie Sabyumva

SES 2020 VIRTUALE

LERNU DE VIA HEJMO

PARTOPRENU DE IE AJN

SPARU TEMPON KAJ VOJAĜON

ALĈU RAPIDE: [HTTP://SES-IKEO.NET](http://ses-ikeo.net)

Virtuala Kongreso de Esperanto



Landaj Reprezentantoj – Perantoj de *Juna Amiko*

Aŭstralio: Aŭstralia Esperanto-Asocio, G.P.O. Box 2122 Melbourne 3001; *info@esperanto.org.au*. **Aŭstrio:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg; *aon.913548977@aon.at*. **Belgio:** Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekenstraat 169, BE-2000 Antwerpen; *financoj@fel.esperanto.be*. **Brazilo:** Brazila Esperanto-Ligo, SDS Bl. P 36, Ed. Venâncio III, sala 303, BR 70393-902 Brasília-DF; *belabutiko@esperanto.org.br*. **Britio:** Esperanto Association of Britain, Esperanto House, Station Rd, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE; *eab@esperanto.org.uk*. **Bulgario:** Mariana P. Evlogieva, PK 973, BG-1000 Sofia; *mrvp@interpres.org*; *ilei@espereto.com*. **Ĉeĥio:** Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-290 01 Poděbrady III.; *polnickypavel@seznam.cz*; *cea.polnický@quick.cz*. **Ĉilio:** Héctor Campos Grez, Casilla 231 Curico; *strigo@esperanto.cl*. **Ĉinio:** Gong Xiaofeng, School of Environmental and Chemical Engineering, Nanchang University, Nanchang, CN-330031; *arko.gong@qq.com*. **Danio:** Arne Casper, Bryggervangen 70 4 tv, DK-2100 København; *arnecasper@yahoo.com*. **Estonio:** Ahto Siimson; *esperanto.ee*. **Finlando:** Paula Niinikorpi, Rusthollintie 6 as 10, FI-28430 Pori; *paula.niinikorpi@gmail.com*. **Francio:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4bis, rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris; *esperanto-france@esperanto.org.net*. **Germanio:** Esperanto-Buchversand, Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, DE-55129 Mainz; *wolfgang.schwanzer@esperanto.de*. **Germanio:** Zsófia Kóródy, Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz; *zsofia.korody@esperanto.de*. **Hispanio:** Pedro Garrote, Apartado 119 Esperanto, ES-47080 Valladolid; Kataluna Esperanto-Asocio, Apartado 1008, ES-08200 Sabadell, *sandra@esperanto.cat*. **Hungario:** Jozsef Nemeth, Fo u. 41/5, HU-8531 Ihász; *jozefo.nemeth@gmail.com* (por superaj membroj de ILEI); Stefan MacGill; *stefan.macgill@gmail.com* (por simplaj abonoj). **Islando:** Islanda Esperanto-Asocio, Pósthólf 1081, Skolavorðustigur 6B, IS-101 Reykjavík; *esperanto@isl.is*. **Israelo:** Gian Piero Savio, Rehov Menora 13/4, IL-5349007 Givatajim; *saviogp@netvision.net.il*; *esperantisto@live.com*. **Italio:** Luigia Oberrauch Madella, via Prampolini 8, IT-43122 Parma; *silkovojo@aliceposta.it*. **Japanio:** Japana Esperanto-Instituto, Japana filio de ILE, JP-162-0042 Tokyo-to, Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3; *esperanto@jei.or.jp*. **Kroatio:** Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb; *marija@hes-keu.hr*. **Kubo:** Kuba Esperanto-Asocio, Apartado Postal 5120, CU-10500 La Habana 2. **Litovio:** Litovia Esperanto-Asocio, ab/k 167, LT-3000 Kaunas; *irenaa@takas.lt*. **No-Zelando:** David Ryan, PO Box 3867, Wellington 6140, *ryangomez@xtra.co.nz*. **Pakistano:** Jawaid Eahsan, P.O. Box 26, PK-60000 Multan. **Pollando:** Magdalena Tatara, Grzegorzeczka 74/4, PL-31-559 Kraków; *mtatara@gmail.com*. **Portugalio:** Portugala Esperanto-Asocio, Rua Dr. Joao Couto 6. R/C A, PT-1500 Lisboa; *asocio@esperanto.pt*. **Rumanio:** Ioan Crâncău, B-dul București 5/53, RO-430281 Baia Mare. **Rusio:** Halina Gorecka, ab. ja. 1205, RU-236039 Kaliningrad; *sezonoj@mail.ru*. **Slovakio:** Peter Baláž, Víťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske; *petro@ikso.net*. **Slovenio:** Višnja Branković, Via Parini 5 IT-34 129 Trieste. **Sud-Afriko:** Colin Beckford, C2 Plaza Hill 3, Bower Road, ZA-7800 Wynberg. **Svedio:** Sten Svenonius, *sten@agado.net*. **Svislando:** Christoph Scheidegger, Im Schleedom 6, CH-4224 Nenzlingen; *ch_scheidegger@bluewin.ch*. **Tajvano:** Reza Kheirkhah, No. 105, Chung Ching Road, Pingtung, 900-73; *rezamenhof@yahoo.com*. **Togo:** Koffi Gbeglo, B. P. 13169, Lome; *esp.togo@cafe.tg*. **Usono:** Esperanto-USA, 91-J Auburn St #1248, Portland ME 04103; *eusa@esperanto-usa.org*. **Por vidhandikapuloj:** Vjačeslav Suslov; *gloro59@yandex.ru*. **Mendojn eblas sendi ankaŭ al** *ilei.officejo@gmail.com*.



METABIEF 23-29.8.2020

